


EL POPOLA 中國新道

# ĈINIO




7

1995

ISSN 0032-4361

- TRANSJARCENTA REFORMADO EN ALTAJ LERNEJOJ
- TIBETANOJ PRI TIBETO
- VIRINOJ, KONSILISTINOJ PRI ŜTATAJ AFEROJ
- SALUTON, "EL POPOLA ĈINIO"!



Konvolvulo

Foto de LIU SIGONG

## INTER NI

Permesu al mi riproĉi iujn aŭtorojn aŭ tradukintojn de kelkaj materialoj pri tio, ke ili uzas tro da neologismoj. Precipe en prozaĵoj, tiaj neologis-

moj tute ne estas necesaj. Kontraŭe, ili malfaciligas la komprenon de la teksto.

**MIKAELO-MARKO  
SOKOLESKU**  
(Rumanio)

Mi petas, ke vi aperigu plu artikolojn pri orienta popola medicino, kiel akupunkturo, fitokuracilo kaj naturkuracilo.

**GIORGIO BIANCHI**  
(Italio)

Mi petas vian pardonon pro mia nekompreneo de unu objekto el via artikolo "La kultura strato Liulichang" en la 1-a numero de 1995. Mi ankaŭ antaŭe legis pri la inkfrotujo, sed mi ne scias, kio ĝi estas. Mi pensas, ke ĉe ni ne troviĝas tia objekto. Mi ne komprenas ankaŭ, ke "en vestiblo estas kolosa ŝtona inkfrotujo 3.5 tunojn peza". Kio ĝi estas kaj kiel oni ĝin uzas?

**H. ILONA**  
(Jugoslavio)

*La objekto, menciita en la artikolo "La kultura strato Liulichang" kaj nekomprenata de s-ino H. Ilona, estas inkfrotujo aŭ, pli ĝuste, tuĉfrotaj ŝtonplatoj. En kaligrafado kaj pentrado ĉinoj ofte uzas penikon, tuĉon, paperon kaj tuĉfrotan ŝtonplaton, kiujn oni kutime nomas "kvar trezoroj de kabineto". Tuĉfrotaj ŝtonplatoj kun multaj specoj produktiĝas en diversaj lokoj de Ĉinio. La 3.5-tuna tuĉfrotaj ŝtonplatoj en la vestiblo de Rongbaozhai estas metiartaĵoj sen praktika valoro. Estas likva tuĉo kaj solida tuĉo. Por uzi tuĉfrotan ŝtonplaton en skribado aŭ pentrado, oni devas unue meti iom da akvo sur la ŝtonplaton kaj poste rond-ire frotadi tuĉon en la akvo, ĝis la akvo fariĝas nigra kaj iom viskoza. Altklasa tuĉo estas farita el fulgo de pino aŭ aleŭrit-oleo, mosko, gumo kaj aliaj ĉ. dek materialoj.*

**La Red.**




# ENHAVO

- 2 *INTER NI*
- 4 Transjarcenta reformado en altaj lernejoj de Ĉinio
- 6 Ĉina Internacia Eldona Grupo
- 8 *VOĈO DE E-ISTOJ:*  
Miaj tri vojaĝoj en Ĉinio
- 10 *ĈINAJ E-ISTOJ:*  
Esperanto-kariero de poŝtisto
- 13 *ESP-NOVAĴOJ*
- 14 Saluton, "El Popola Ĉinio"!
- 16 *POR KOMENCANTOJ:*  
Ellernu memamon
- 17 *EKONOMIE:*  
Por elliberigi sin el malriĉeco
- 18 Febra lernado de aŭtostirado en Pekino
- 20 *REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO:*  
Regiono sopirata
- 24 Tibetanoj pri Tibeto
- 26 *ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ:*  
Ji-nacio, adoranto de fajro
- 28 Kulto de oboj
- 29 *BELECO DE ĈINIO:*  
Muzeo de Antikvaj Sonoriloj
- 32 *ĈINA KULTURO:*  
Ĉu la ĉina lingvo malfacila? (I)
- 34 Nodo-farado
- 36 Virinoj, konsilistinoj pri ŝtataj aferoj
- 38 *VIRINOJ KAJ INFANOJ:*  
Mi kaj mia termolinio
- 40 La Pekina Urĝa Medicina Centro
- 42 Intima najbareco
- 43 Nova dimensio en Esperantio
- 44 Pri la ĉinaj gimnastikaj teamoj
- 46 *KURANTAJ AFEROJ*
- 48 *EL ĈINAJ GAZETOJ*
- 49 Du poemoj
- 50 *GALERIO:*  
Trikolora tombogarda besto
- SUR LA KOVRILLO:*  
Tibeta knabino
- Foto de Yuan Xuejun
- 2 Konvolvulo
- SUR LA DORSKOVRILO:*  
Pagodo en Xishuangbanna

## LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Shannan-regiono (p. 24)
2. Chengdu (p. 4)
3. Shuangjiang-a Lahu-, Va-, Blang- kaj Taj-nacia Aŭtonoma Gubernio (p. 36)
4. Weifang (p. 20)
5. Dunhuang (p. 48)



# Transjarcenta reformado en altaj lernejoj de Ĉinio

**A**NTAŬ la fino de la 20-a jarcento la ĉinoj jam direktas sian rigardon al la mezo de la venonta jarcento, kiam ili konstruos Ĉinion en modernan landon meze evoluintan. Por tiu grava historia tasko estas bezonata granda nombro da transjarcentaj talentuloj. La bezono strikte rilatas al la ekstera medio en la pasintaj dekelkaj jaroj: la ekonomia sistemo de Ĉinio multe ŝanĝiĝis kaj ĝi bezonis koncernan reformadon de altaj lernejoj.

## REFORMADO DE LA ADMINISTRADO

Ĉinio havas 1 064 altajn lernejojn, investitajn ekskluzive de la ŝtato en la pasinteco. Sub tiu sistemo la financa deveno estis limigita, kio malhelpis la disvolviĝon de la altaj lernejoj.

La Ŝtata Eduka Komisiono de Ĉinio prenas reformadon de la administrado de altaj lernejoj kiel sian ĉefan taskon. Ĝi kategorie montris, ke la registaro devas simpligi sian administradon, iom post iom ŝanĝi sian monopoligon de edukado en makroreguligon kaj doni pli da rajtoj al la altaj lernejoj en ties administrado. Pro tio naskiĝis diversformaj unuigitaj lernejoj, kiaj tiuj funkciigataj kune de la centra registaro kaj la loka registaro, de alta lernejo kaj entreprenoj.

La Pekina Aeronautika kaj Kosmonautika Universitato antaŭe estis gvidata rekte de la centra registaro, sed nun ĝi estas funkciigata kune de ĝi kaj la pekina magistrato. Dank' al tio ĝi akiris financon subvencion de ambaŭ flankoj.

La Sichuan-a Unuigita Universitato estas malfermita al la socio kaj havas kunlaboran rilaton kun 160 grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj-grupoj. Dank' al la kunlaboro, ĝi akiris abundon da fruktoj en kulturado de talentuloj, solvado de scienc-teknikaj problemoj, teknika konsultiĝo kaj ekspluatado de novaj produktaĵoj. Nun la universitato estas gvidata de la direkcio el delegitoj de la provinca kaj urba registaroj, 14 grandaj entreprenoj kaj aliaj sociaj rondoj. Ĉio ĉi multe plifortigis la financon de la universitato.

La Jiangxi-a Universitato kaj Jiangxi-a Politekniko estas unuigitaj en Nanchang-universitaton. Post la unuiĝo la establo de la fakultatoj estis reformita: Iuj superflujaj fakoj estas nuligitaj, unuiĝo de natur-sciencoj kaj teknika studo realiĝis kaj novaj lernofakoj naskiĝis.

Pli multaj altaj lernejoj de Ĉinio, utiligante la geografian proksimecon, efektivigis iagrade lozan unuiĝon: reciproka invitado de instruistoj, reciproka utiligo de lerneja spaco, kuna scienc-

esplorado, kuna kulturado de esplor-studentoj kaj junaj instruistoj. Dank' al la reformado, la studentoj povas ĉeesti lecionon ankaŭ en aliaj lernejoj. Tiamaniere oni povas ĝui avantaĝon kune kaj tiel multe leviĝas la kvalito de instruado.

Unuiĝo estas tendenco de la reformado kaj disvolviĝo de altaj lernejoj de Ĉinio. Ĝi rompita la hermetikecon de la lernejoj kaj levis la aktivecon de la sociaj rondoj en funkciigado de altaj lernejoj. Dank' al la reformado la lernejoj povas kolekti monon per diversaj kanaloj por akceli la turniĝon de sciencaj fruktoj en produktajn fortojn kaj antaŭenpuŝi la ekonomian disvolviĝon.

## POR KULTURI MULTKAPABLAJN PERSONOJN

La moderna socio postulas, ke la homoj estu alte klerigitaj kaj posedu ne nur scienc-teknikajn sciojn, sed ankaŭ kapablon solvi ekonomiajn problemojn kaj havu kreivecon kaj kuragecon pri konkurenco. La diplomitoj, elkulturitaj sub la malnova sistemo de altaj lernejoj, jam ne povas kontentigi la socian bezonon. Tial elkulturi altklasajn multkapablajn personojn estas urĝa tasko de la altaj lernejoj en Ĉinio, alivorte, la reformado de altaj lernejoj ja celas tion.

La troa specialiĝo de fakoj es-



tas unu el la kaŭzoj, kiuj faras la studentojn ne bone adaptiĝantaj al la socio. Pro tio preskaŭ ĉiuj lernejoj faras reguligon de siaj fakoj: nuligi iujn malnovajn fakojn, funkciigi urĝe bezonatajn fakojn, inviti talentulojn, enkonduki sciencajn fruktojn kaj krei progresajn sciencojn mondnivelajn. Por kombini kulturadon de multkapablaj studentoj kun tiu de fakaj personoj, iuj lernejoj ne dividas fakojn inter la novaj studentoj kaj tion faras nur en alta klaso, kiam la studentoj posedas solidajn fundamentajn sciojn.

Por fondi la biomekanikan fakon, kiun Ĉinio ne havis sisteme, Chongqing-universitato invitis famajn alilandajn fakulojn fari prelegon kaj decidis esplori galoduktan reologion. Nun tiu fako jam fariĝis grava fako en Ĉinio, kaj ĝia esplorado antaŭiras en la mondo.

Servi al la ekonomia konstruado estas celo de la reformado de altaj lernejoj. La te-kultura fako de la Hunan-a Agronomia Universitato instruis antaŭe nur tean kulturadon, nun ĝi instruas ne nur la bazajn teoriojn kaj teknikojn pri te-kulturado, sed ankaŭ sciojn pri tea prilaborado kaj komercado. Serio da produktaĵoj nove ekspluatitaj de la instruistoj kaj studentoj gajnis kvar orajn medalojn en internacia foiro.

Por doni al la studentoj la rajton mem decidi, kion ili devos studi kaj kiamaniere ili studos, la altaj lernejoj de Ĉinio nun praktikas la novan "poentan sistemon" anstataŭ sistemo de difinita lernotempo, praktikas kompletigan elastan sistemon, sistemon pri ĉefaj kaj akcesoraj studobjektoj kaj sistemon pri duobla licencio. Iuj lernejoj funkciigas ankaŭ "dua-fakan kurson" por la studentoj.

Nun en la ĉinaj altaj lernejoj la studentoj ofte ĉeestas lecionon ankaŭ en aliaj fakultatoj. Antaŭe ĉiu klaso havis nur unu komunan horaron, kaj nun ĉiu studento havas sian propran horaron. Tio



En la laboratorio de Qinghua-universitato

montras, ke granda nombro da multkapablaj personoj elbakiĝos el altaj lernejoj.

Ankaŭ la kulturado de esplorstudentoj estas en reformado. Antaŭe la altklasaj profesoroj sin okupis ĉefe pri tradiciaj fakoj, tial la aplikaj fakoj urĝe bezonataj de la socio estis malfortaj, kaj plie, la kulturado estis simpla kaj ne povis kovri la bezonon de la disvolviĝo de la merkata ekonomio.

La ŝtato ellaboris novan politikon favoran al juĝo de novaj fakoj kaj akcepto de studentoj. Krom akcepti studentojn per ŝtata ekzameno ĉiujare, la ŝtato ankaŭ pligrandigas la nombron de studentoj kulturataj komisiite de entreprenoj kaj kuraĝigas spertajn funkciulojn daŭre studi por pli alta rango kaj altajn lernejojn kulturaj esplorstudentoj kune kun scienc-esploraj organizaĵoj kaj entreprenoj.

La 23-jara Li Jin, komputerologia doktoro de Qinghua-universitato, eniris la universitaton en 1987, kiam li finis studadon de la unua lernojaro en supera mezlernejo. La universitato ellaboris apartan planon por kulturaj tiun ĉi elstaran studenton. En 3.5 jaroj Li Jin finstudis la studentajn kaj magistrajn lernobjektojn destinitajn por sep jaroj. En sia doktoriĝa studo li pro-

funde studis pri la ŝlosila tekniko en la plej novaj multmediumaj komputeroj kaj akiris mondnivelajn scienc-esplorajn fruktojn.

Multaj universitatoj alprenis novan sistemon por kulturaj esplorstudentoj kaj plifortigi iliajn sociajn praktikojn.

Kulturado de junaj kaj mezaĝaj fakuloj estas strategie grava problemo por altaj lernejoj de Ĉinio en kulturado de transjarcentaj personoj.

En multaj altaj lernejoj oni elektas elstarantojn inter junaj kaj mezaĝaj instruistoj kaj esplorstudentoj, promocias ilin kaj donas al ili gravajn taskojn, por ke ili fariĝu altnivelaj fakuloj kiel eble plej rapide. La universitatoj perfektigas la ekzamenojn kaj juĝsistemojn, starigas diversajn fondusojn kaj donas al junaj kaj mezaĝaj instruistoj multe da ŝancoj sin perfektigi.

Tian Gang eniris la Pekinan Universitaton post ekzameno en 1981 kaj studis en ĝia matematika fakultato kiel esplorstudento. Poste li estis sendita lerni en la Universitato de Princeton de Usono. En 1990 li estis engaĝita kiel profesoro de la Pekina Universitato kaj en 1994 li estis honorita per Ottman-premio donita de la Usona Ŝtata Scienc-fonduso

# ĈINA INTERNA- CIA ELDONA GRUPO



ĈIEG eksponis siajn eldonaĵojn en libro-ekspozicio en Frankfurt en oktobro 1994.

**L**A Ĉina Internacia Eldona Grupo (ĈIEG), kiel la plej granda internacia eldona organizaĵo de Ĉinio, plenumas la taskon eldoni, presi kaj distribui. En ĝi servas pli ol 4 000 laborantoj kaj 100 alilandaj specialistoj. Inter ili estas niaj superaj redaktoroj, raportistoj, tradukistoj, ekonomikistoj kaj kontistoj. Kun modernaj ekipaĵoj por redaktado, kompostado, presado kaj distribuado ĝi havas 5 redakciojn kaj 11 eldonejojn, kiuj ĉiujare eldonas librojn en 20 lingvoj pri politiko, juro, arto, infano, turismo, klasika literaturo, ĉina medicino, lingvo-instruado, moroj, kutimoj ktp. La redakcioj eldonas 7 revuojn, kiuj konigas la reformadon kaj pordomalfermon de Ĉinio, ĝian konstruadon kaj ĝian tradician kulturon kaj donas plej freŝdatajn informojn pri komercado kaj kultura vivo.

La eldonaĵoj estas presataj en la Fremdlingva Pre-

sejo propra al la grupo. La presejo kun internacie avangardaj instalaĵoj povas presi kaj komposti en 50 lingvoj kaj ĝi estas la unika fremdlingva presejo de Ĉinio. La Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio sub la grupo kaj ĝiaj agentejoj en Usono, Britio, Francio, Japanio, Egiptio, Tanzanio kaj Hongkong distribuas fremdlingvajn eldonaĵojn en 182 landoj kaj regionoj. La grupo havas sian filion en Ŝanhajo, Xiamen, Yantai, Wuxi, Guilin kaj aliaj urboj de Ĉinio. Krom diverslokaj fremdlingvaj librejoj, ankaŭ la libro-vendejoj starigitaj en grandaj hoteloj, stacidomoj, kajoj, aerodromoj, landlimaj havenoj, turismaj lokoj k.a. liveras fremdlingvajn eldonaĵojn. La grupo havas sian distribuan sistemon en kaj ekster Ĉinio. La Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio vendas ankaŭ ĉinajn librojn, metiartaĵojn, pentraĵojn, mikroeldonaĵojn kaj videobendojn. La grupo kaj ĝiaj membroj plurfoje

kaj Usona Ŝtata Scienca Komisiono.

La Alteduka Buroo de Tianjin invitis kontraŭ granda pago 100 famajn ĉinajn fakulojn kaj doktorigajn instruistojn kulturi junajn kaj mezaĝajn sciencistojn. La sinteza laboratorio pri fiziko de prof. Tsung-Dao Lee de Fudan-universitato invitis al si 14 doktorojn el aliaj landoj kaj dank' al tio la scienc-esplora nivelo de Fudan-universitato impete levigis. Wuhan-universitato havas sian akademian kandidaton. En ĝi la junaj fakuloj ludas rimarkindan rolon en instruado kaj scienc-esplorado.

Por ke la junaj kaj mezaĝaj instruistoj volonte laboru en la lernejoj, oni donas al ili favorajn kondiĉojn en la vivo.


En la pasinteco la ĉinaj altaj lernejoj praktikis la edukan sistemon, sub kiu la registaro sola respondecis pri la elspezo de la alta edukado kaj la lernejoj solaj respondecis pri laborpostenigo de siaj diplomitoj. Kaŭze de tio, multaj diplomitoj ne povis utiligi siajn sciojn por disvolvi sian kapablon kaj iuj studentoj malstreĉis sian energion en studado. Por ŝanĝi tiun fenomenon Ĉinio praktikas novan sistemon en iuj altaj lernejoj, sub kiu oni mempage studas kaj mem serĉas profesion

post sia diplomitiĝo.

Nun la jara lernopago por ĉiu studento estas pli ol 1 000 juanoj. Por ke la pago ne kaŭzu malfacilon al la malriĉaj elstaraj studentoj, oni alprenis serion da rimedoj, ekz., plimultigi stipendion, doni al studentoj ŝancon de lukro, nuligi aŭ malpliigi lernopagon al la ekstreme malriĉaj studentoj kaj doni al ili apartan monhelpon.

La studentoj mem pagas por sia lernado, sendube ili havas la rajton mem elekti laboron. La reformoj kuraĝigas la studentojn kombini la lernadon kun la socia praktiko. En la porlukra laboro ili havigis al si memfidon pri sia es-





Eldonaĵoj de ĈIEG

Ĉiujare partoprenas internacia libro-ekspozicion kaj aranĝas "ekspozicion de ĉinaj libroj" en aliaj landoj.

Kunlaboro kaj mendo aŭ abono estas bonvenaj. Bv. kontaktiĝi kun: Ĉina Internacia Eldona Grupo  
24 Baiwanzhuang Road, Beijing 100037  
Tel: 832-6644 Fax: 832-6605 Telex: 222374  
FLPDA CN

Membroj de ĈIEG

**Foreign Languages Press** Tel: 832-0579 Fax: 832-6642

Dolphin Books

Sinolingua

**New World Press** Tel: 832-6644 Ext. 2540

**Chinese Literature Press** Tel: 832-6678

**Beijing Review** Tel: 832-6628; 832-6330

Chinafrica

**China Today** Tel: 832-6037

China Today Press

**El Popola Ĉinio** Tel: 832-6030

Cina Esperanto-Eldonejo

**China Pictorial**

*Chegongzhuang Xilu, Beijing 100044* Tel: 841-3023

China Pictorial Publishing Company

**Peoples' China**

*3 Chegongzhuang Rd., Beijing 100044* Tel: 831-4443

People's China Press

**China International Book Trading Corporation (CIBTC)**

*35 Chegongzhuang Xilu, Beijing 100044*

Tel: 841-4284 Fax: 841-2023

China Book Import Centre

China Microfiche Publications Import & Export Co.

Morning Glory Press

**Beijing Foreign Languages Printing House**

*19 Chegongzhuang Xilu, Beijing 100044* Tel: 841-3141

**Beijing CIPG Paper Company**

*89 Xisanhuan Beilu, Beijing 100081* Tel: 841-7775

**CIPG Electronic Typesetting Centre** Tel: 832-6620

tonteco kaj konis la socian bezonon pri fakuloj. Por havi idealan laboron en la estonteco ili diligente lernas kaj hardas sin en multaj kampoj por levi sian laborkapablon.

## REFORMADO DE GRAVAJ UNIVERSITATOJ

La altaj lernejoj de Ĉinio faras reformadon kun la celo identigi la altedukan sistemon de Ĉinio kun tiu de la mondo en la 21-a jc.

Tamen, konsidere la naciajn fortojn, Ĉinio ankoraŭ ne kapablas samtempe reformi ĉiujn siajn altajn lernejojn, tial ĝi dediĉas sian atenton ĉefe al la gravaj

universitatoj. Por la teknika revolucio en la 21-a jarcento nepre necesas por Ĉinio dediĉi siajn fortojn al ĉ. 100 gravaj universitatoj kaj fakoj, por ke en la komenco de la 21-a jc ili enviciĝu inter tiuj avangardaj en la mondo.

Por identigi sian altan edukadon kun tiu de la mondo Ĉinio devas bone scii la diferencojn inter si kaj la mondo en instruado, scienc-esplorado kaj administrado. La unika rimedo malgrandigi la diferencojn estas reformi la malnovan sistemon de administrado de lernejoj.

Jiangxi-provinco unuigis siajn du samgradajn universitatojn kaj

decidis investi por tio 130 milionojn da juanoj. Shaanxi-provinco ellaboras planon ĉefe por konstrui Shaanbei-universitaton per investaĵo de 300 milionoj da juanoj. Jiaotong-universitato de Ŝanhajo asignis 50 milionojn da juanoj por bezono de la gravaj fakoj kaj kulturado de elstaraj fakuloj.

La ĉinaj altaj lernejoj marŝas sur la vojo de reformado kun peza tasko. Iuj el ili jam liberigis sin el la malfacila situacio kaj aliaj ankoraŭ pene paŝas en la malfacilo. Sed ĉu sukcesoj, ĉu malfaciloj, ĉio montras, ke tio estas vojo de espero. ■

# Miaj tri vojaĝoj en Ĉinio

de MAURICE SUJET (Francio)

**E**N ĉiu Universala Kongreso, de multaj jaroj, mi partoprenas, kun granda intereso, la tradician kunvenon organizitan por la legantoj de "El Popola Ĉinio". Ĉiam estas por mi granda plezuro revidi miajn ĉinajn geamikojn de EPC kaj Radio Pekino. En tiu okazo mi havas ŝancon rediri, kiel mi ŝatas tiun belan revuon, kiel multe ĝi alportis kaj alportas al mi pri Ĉinio, kaj kiel mi kaptas ĉiun okazon konigi vian interesan revuon al miaj francaj amikoj, esperantistaj kaj neesperantistaj. Mi uzas EPC samtempe por montri la taŭgecon de Esperanto, por pruvi ĝian universalecon, kaj por konigi vian landon, ĝian antikvan historion, ĝian riĉan kulturon kaj ĝian nunan eksterordinare rapidan evoluon.

Kiam ni estis junaj, kaj eĉ poste, la simpla ideo ke ni povus iam vojaĝi al Ĉinio estis por ni nerealigebla revo. Mia unua vizito estis en 1982, kaj poste mi vizitis Ĉinion en 1986 kaj 1992. Kvankam ĉiu vojaĝo daŭris nur tri semajnojn kaj montris al mi nur parton de via grandega lando, mi povis propraokule sperti ĝian evoluon.

En 1982 mi kun grupo de emeritaj francaj geinstruistoj vojaĝis al Ĉinio, kiel emerita direktoro de gimnazio. Post nur 15 horoj da flugado ni povis ekkonatiĝi kun tute nova mondo. Al ni, kiuj tiam ne multe vojaĝis ekster Eŭropo, ĉio ŝajnis malsimila: la klimato, la homoj, la pejzaĝoj, la domoj, la kutimoj, la manĝoj ktp.,

tiel ke neniam ni forgesos niajn unuajn impresojn. Por mi kaj la kvar aliaj geesperantistoj de nia grupo la plezuro estis duobla, ĉar ni povis havi kontaktojn kun ĉinaj gesamideanoj en Chengdu kaj Pekino, kiuj forte surprizis kaj impresis miajn neesperantistajn gekolegojn. De tiam ili ne plu bagateligis Esperanton kaj mia samĉambrano en la vojaĝo, licea instruisto pri la angla lingvo, antaŭe skeptika pri Esperanto, decidis lerni ĝin. Mi ankoraŭ bone memoras nian renkontiĝon kun kvin simpatiaj gesamideanoj en nia Chengdu-a Hotelo, kiuj transdonis al ni la skribajn salutojn de la prezidanto de la esperantista grupo, bedaŭrinde malsana. Kaj kiam ili poste invitis nin ĉeesti la vesperan kurson de Esperanto, ni entuziasme jesis. Ni trovis nin antaŭ klasĉambro plena de fervoraj studentoj kaj ĉiu el ni siavice salutis ilin.

Sed la kulmino okazis en Peki-


no, kiam dek unu geesperantistoj de EPC kaj Radio Pekino akompanis nin kaj gvidis nin sur la Granda Muro kaj ĉe la tomboj de Ming-dinastio. La Granda Muro estas "la sola homa konstruaĵo videbla de la luno", kion konis eĉ infanoj. Por ni marŝi sur la Granda Muro estis jam vera konkretigo de revo apenaŭ kredebla, sed plie tiam ni povis libere paroli en tuta egaleco pere de Esperanto, tio estis vere eksterordinara. La gesamideanoj de Radio Pekino intervjuis nin kaj unu monaton poste, en nia franca vilaĝo, mi povis aŭskulti — kaj registri — tiun intervjuon. Mi ankoraŭ hodiaŭ aŭdas nian intervjuiston.

Tiu unua vojaĝo kondukis nin de Kantono al Pekino tra Wuhan, Chengdu, Xi'an, Luoyang kaj tiam ni estis inter la unuaj turistoj, tiel ke la ĉinoj ankoraŭ ne alkutimiĝis je vizito de tiom da eksterlandanoj, kaj mi memoras, ke dekoj da homoj amasiĝis ĉir-

La aŭtoro (la kvina de maldekstre) kaj ĉinaj esperantistoj en Pekino en 1982







La aŭtoro (la dua de dekstre) gastis ĉe s-ro Ivan Ko (maldekstre) en 1986.

kaŭ niaj aŭtobusoj por scivoleme observi nin, niajn vestojn kaj niajn ŝuojn. En la granda parko de Wuhan pere de kelkaj anglaj vortoj mi parolis kun ĉina emerito-kolego kaj baldaŭ ni troviĝis en centro de scivolema rondo, ankaŭ tio estas por mi bona memoro pri la bezono de kontaktoj inter homoj kaj pri la neceso de Esperanto. Jam en suda Ĉinio, aparte en Kantono, estis antaŭsignoj de ŝanĝoj, kiujn mi poste konstatis en la tuta Ĉinio: la unuformaj bluaj kostumoj estis malpli oftaj ol en Pekino, la virinoj estis ofte elegante vestitaj per buntaj roboj kaj ĉiam — kiel fakte en la tuta Ĉinio — la ĉarmaj ĉinaj infanoj estis bele vestitaj kun pli da fantazio.

Mia dua vizito en 1986 okaze de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto ebligis al mi konstati la ŝanĝojn, pri kiuj mi multe legis. La evoluo estis ĉie videbla kaj mi ofte diris al miaj amikoj, ke sur kelkaj kampoj en nur kvar jaroj estis preskaŭ kvardek jaroj da evoluo. Ĉie sur bazaroj aŭ en vendejoj, aŭ eĉ sur trotuaroj vendistoj proponis varojn kaj nutraĵojn, ĉie oni konstruis novajn vojojn, novajn domojn, novajn domogojn, novajn vilaĝojn kaj jam la homoj ne plu grupiĝis ĉirkaŭ nia aŭtobuso por ekzameni nin, ĉar ili tute alkitimiĝis je vizito de tiuj foraj turistoj, kiuj ne plu aspektis al ili kiel marsanoj aŭ enloĝantoj de alia planedo. Ĉirkaŭiris nin

nur vendistinoj por prezenti siajn delikate faritajn manlaboraĵojn.

Dum mia dua vizito al la mondfama “enterigita armeo” en Xi’an mi povis sperti la grandegajn ŝanĝojn: en 1982 ekster la kradoj, laŭ kiuj oni eniris en la muzeon, dekoj da virinoj ofertis belajn mankudritajn buntajn infanajn vestojn — en 1986 mi ne plu rekonis la lokon, ĉar ambaŭflanke de la vojo al la muzeo estis eble cento da budoj, vendejoj, butikoj, kiuj proponis plej diversajn varojn aŭ objektojn por allogi la turistojn. Mi preskaŭ perdiĝis inter ili kaj estis feliĉe, ke super amaso da kapoj mi vidis la Esperantan flageton, alte svingitan de nia sindonema ĉina ĉiĉerono. Tiu antaŭkongreso donis al ni eblecon reviziti Xi’an kun novaj eltrovaĵoj kaj konatiĝi kun Nankino kaj kelkaj belaj lagoj, sed ĉefe ĝi ebligis al ni, je ĉiu etapo, renkontiĝi kun fervoraj ĉinaj geesperantistoj, konatiĝi kun ili, ĝui iliajn kantojn. Ĉiam estis emociaj kunvenoj, kies memoron mi fidele konservas. Kompreneble, mi memoras ankaŭ la multajn bankeadojn, per kiuj oni regalis nin, la multnombrajn pladojn kun bonegaj manĝaĵoj, la arte skulptitajn legomojn, la afablajn akceptojn de la lokaj aŭ turismaj instancoj kaj la multnombrajn tostojn. La intereso pekina kongreso kaj la sekvanta postkongreso ankaŭ montris al ni multajn vidindaĵojn kaj estis ankaŭ okazo de multaj banke-

doj, kie vere firmiĝis mia amikeco kun multaj ĉinaj gesamideanoj, kiuj ĉiam afable helpis min diversmaniere. Mi memoras ilin en la belegaj kadroj de Guilin kaj Hangzhou, kaj ilia fervora entuziasmo estis por mi kiel juniga bano.

Tial en 1992 mi aliĝis al la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto en Qingdao por Esperante trovi tiun revivigan etoson, kaj mi tute ne estis elrevigita. Ĉar ni estis nur dekoj da neazianoj inter centoj da azianoj, ni ankoraŭ pli bone spertis ĉiutage la afablecon kaj la helpemon de niaj ĉinaj gesamideanoj. Ne eblas korespondi kun ili ĉiuj, sed mi ne forgesas ilin kaj de tempo al tempo pere de miaj videofilmoj mi revidas ilin. La postkongreso de la pacifika kongreso kondukis nin al Ji’nan, antikva “urbo de fontoj”, al la fama Taishan, al Qufu, hejmloko de Konfuceo, kaj fine al Ŝanhajo, kiu pretiĝas por la 21-a jarcento. Mi jam alkitimiĝis je la rapida evoluo de la tuta Ĉinio, sed tamen la grandega ponto de Ŝanhajo, la multnombraj kuniĝantaj vojoj, kiuj desegnas kompleksajn kurbojn ĉirkaŭ ĝi, la tutnovaj kvartaloj kun imponaj domegoj, la senĉesa trafiko, la lumreklamoj de tiu urbego impresis min.

Inter ĉiuj miaj ĉinaj geamikoj mi volas aparte danki mian unuan ĉinan amikon Ivan Ko, kun kiu mi konatiĝis jam en la kongreso de Lucerno en 1979. Lia afableco, lia gastameco kaj lia delikateco multe kontribuis por konigi al mi ĉinan vivmanieron kaj ĉinan gentilecon. Li estas mia plej fidela ĉina korespondanto kaj ĉiuj membroj de lia familio estas same simpatiaj, ankaŭ ilin mi dandas.

Konklude de tiu tute nekompleta artikolo, okaze de la 45-jariĝo de “El Popola Ĉinio” mi deziras al “nia” ŝatata revuo ankaŭ multajn prosperajn jarojn por la intereso kaj por la plezuro de viaj legantoj en la tuta mondo. Kaj mi esperas, ke mi denove havos okazon revidi Ĉinion kaj renkonti miajn multnombrajn ĉinajn geamikojn. ■



S-ro Zhang Linrui en desegnado de poŝtstampo

ĈINAJ E-ISTOJ

## ESPERANTO-KARIERO DE POŝTISTO

Teksto de HAN PING

Fotoj de LI CHUNGENG

**E**N la ĉina Esperantujo la nomo Zhang Linrui ligiĝas kun memorigaj poŝtstampiloj de Esperanto. Antaŭ 30 jaroj li desegnis la unuan memorigan poŝtstampilon de Esperanto de Ĉinio. De la lastaj 4 jaroj li servas kiel speciale invitita desegnanto de la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco. Ĝis nun li jam desegnis pli ol 180 memorigajn poŝtstampilojn de Esperanto por Haikou kaj aliaj lokoj. Tio estas malofta eĉ inter profesiaj desegnistoj de poŝtstampiloj. Krome, li desegnis ankaŭ dudekelkajn memorigajn kovertojn de Esperanto kaj faris pli ol cent specojn da memorigaj kovertoj de Esperanto.

Zhang Linrui estas honora komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo. En 1924 li naskiĝis en Ŝanhajo kaj tie li pasigis sian knabecon en lernejo. En la lasta periodo de la 3-a jardeko li ekonis Esperanton kaj komencis lerni la lingvon aŭtodidakte. En 1949 li transposteniĝis al la poŝt-

oficejo de Changshu, Jiangsu-provinco. En 1958 li ricevis brustan operacion. Dum la kuracado en sanatorio li funkciigis Esperanto-kurson. De la 6-a ĝis la 8-a jardekoj li multfoje organizis Esperanto-kurson en la poŝtofiĉejo, laborista kultura domo kaj aliaj lokoj kaj faris senpagan instruadon per siaj lernomaterialoj. Sume pli ol 300 personoj lernis Esperanton. Intertempe fondiĝis ankaŭ la Esperanto-grupo de Changshu, iniciatite de li.


En 1979 Zhang Linrui emeritiĝis. De tiam li dediĉis pli da tempo al plivastigo de Esperanto. En aŭgusto de la sama jaro li sola fondis la mimeografitan Esperanto-revuon "Verda Lampiro", dezirante, ke ĝi flagru lampire en la kampo de Esperanto. Per ŝtalplato, gravurilo kaj broso li sola plenumis redaktadon, kompostadon kaj presadon. En la revuo legeblas ne nur Esperanto-informoj en- kaj eksterlandaj, gramatikaj lecionoj kaj poemoj, sed ankaŭ disertaĵoj pri Esperan-

to kaj la movado. La revuo estas vaste ŝatata pro siaj enhavo kaj presarto. Nun ĝi trovas legantojn tra Ĉinio.

Zhang Linrui renkontis diversajn malfacilojn en sia redaktado, sed la idealo de Esperanto kaj la sindonemo de la pioniraj esperantistoj ĉiam nutris lin per inspiro kaj forto. Por la revuo "Verda Lampiro" li oferis multe da energio kaj mono, opiniante, ke estas tute inde, se tio utilas al la Esperanto-movado. Ĉiu numero de la revuo estas presita je pli ol 200 ekzempleroj, kiujn li senpage donacas al diverslokaj esperantistoj. Ĝis la fino de 1994 "Verda Lampiro" jam eldoniĝis je 300 numeroj.

Dank' al "Verda Lampiro", Zhang Linrui konatiĝis kun multaj esperantistoj-amikoj. Li estas tre ŝparema. En korespondado liaj amikoj ofte ricevis kovertojn faritajn de li mem, el kiuj iuj estis faritaj el uzitaj kovertoj. Ankaŭ la grandeco de leterpapero estis difinita laŭ la enhavo, sen superflua interspaco krom la






Ekzempleroj de "Verda Lampiro"



Memorigaj poŝtstampoj desegnitaj de s-ro Zhang Linrui



S-ro Zhang Linrui (dekstre) kaj liaj iamaj gvidantoj





S-ro Zhang Linrui kaj liaj familianoj

necesaj marĝenoj. En la novjara tago kaj aliaj festotagoj, liaj amikoj ricevis de li leterojn entenatajn en koloraj kovertoj faritaj de li mem.

Zhang Linrui havas feliĉan familion. Lia edzino estis lia kolegino en la poŝtofacejo kaj emeritiĝis en 1975. La harmonia geedzeco jam daŭris duonjarcenton. Ili havas du gefilojn. La tuta

familio plene subtenas Zhang Linrui en lia Esperanta kariero. La filo respondecas pri aĉetado de papero por la revuo, la filino pri ĝia sendado kaj la edzino zorgas pri la ĉiutagaj korespondaĵoj. Ŝi bone zorgas pri li en la vivo. La genepoj estas denaskaj esperantistoj. Nun lia pliaĝa nepo jam havas filineton.

Zhang Linrui suferas de pul-

ma emfizemo kaj aloritmio. Pro tio li ne povas malsupreniri de sia apartamento sur la tria etaĝo. Ĉiutage, krom televidi kaj legi librojn, ĵurnalojn kaj gazetojn, li sin okupas per laboro por Esperanto: desegni poŝtstampilojn, verki artikolojn por gazetoj en Esperanto, korespondi kun siaj amikoj en Esperanto ktp. Eĉ kiam li kuŝis en hospitalo post operacio en la antaŭlasta jaro, li ankoraŭ ne ĉesigis tion. Li ŝatas pentradon kaj ankaŭ filatelion.

Zhang Linrui multe kontribuis por Esperanto, precipe por poŝt-telekomunikado. Liaopinie, la kaŭzo, kial Esperanto havas tiel potenca vivipovon, ĝuste kuŝas en tio, ke Esperanto estas utila ilo. Por popularigi Esperanton nepre necesas senĉese apliki ĝin.

Zhang Linrui sindoneme daŭrigas sian kontribuadon al Esperanto. ■

## Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo


# ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO

La libro konigas al vi la ĉinajn historion, geografin, kulturon, pikturon, metiarton, literaturon, turismon, Esperanto-movadon k.a. Se vi volas havi sciojn pri Ĉinio aŭ fari turisman vojaĝon al ĝi, legu la libron, kiu certe interesos kaj helpos vin.

Formato: 14 cm. × 20.4 cm. 330 p. kun 16 koloraj kaj 56 nigra-blankaj bildoj.

Prezo: 8.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fakoj de EPĈ, Libroservo de UEA aŭ peranto de EPĈ en via lando.



## ESP-NOVAĴOJ

● Januare de 1995 la Yangzhou-a E-Asocio kaj Yangzhou-a Eduka Buroo de Jiangsu-provinco de Ĉinio kune funkciigis mezlernejan E-kurson, kiun partoprenis pli ol 100 geknaboj. Salutkartoj estos bonvenaj. La adreso: Cui Jianhua, aplika fremdlingva departemento. Nankina Universitato, Jiangsu, Ĉinio, 210093.

● Decembre de 1994 ĉina veterana esperantisto s-ro Hu Guozhu faris prelegon "Esperanto — lingvo de espero" al la unuaklasaj studentoj de la Medicina Universitato Sun Yatsen de Kantono. Post la prelego 119 studentoj anoncis sin al lernado de Esperanto. Februare de 1995 la universitato ekfunkciigis E-kurson gvidatan de s-roj Shi Chengtai kaj Liang Yingxiang.



Poŝtstampoj kun vortoj Esperantaj kaj ĉinlingvaj

● Novembre kaj decembre de 1994 la Poŝta-telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis 4 seriojn da poŝtmarkoj: "Tri Gorgoj de Yangzrivero", "Fama Ĉina Klasika Romano Tri Regnoj", "Specialaj Ekonomiaj Distriktoj" kaj "Antikvaj Pagodoj de Ĉinio". En la emisijaj tagoj la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis stampilojn faritajn de s-ro Zhang Linrui en la ĉina lingvo kaj Esperanto.

● La ĉina natura pitoreskejo Jiutouya situas en la ŝtata arbara parko Shimantan en la suda parto de Henan-provinco. Por propagandi Esperanton la Pingdingshan-a E-Asocio de Henan-provinco kaj la administracio de la parko decidis konstrui tie "Stelea Galerio de Ĉinio" kaj deziras, ke esperantistoj kontribuu sian artaĵon al la galerio aŭ ekspoziciejo de la pitoreskejo. Ili povas kontribui kaligrafaĵojn en la ĉinaj ideogramoj kaj Esperanto, pentraĵojn, fotojn, skulptaĵojn k.a. Ĉiu estu 20 × 20 — 100 × 100 cm. La kontribuanto devas sendi ankaŭ sian koncizan aŭtobiografion, 2 fotojn lastatempajn, unu koverton kun poŝtmarkoj. Se vi volas la detalon, skribu al s-ro Guo Minchang, Jiaoyuban, Miaojie, Wugangshi, Henan-provinco, Ĉinio.

● Malgraŭ la milito kaj nebona situacio, la Esperanto-Societo "Teslić" de Serbio reaktivis komence de 1995 kaj sukcesis haltigi la disiĝon de la societo. En 1995 la societo planas organizi kursojn por membroj; realigi kontakton kun e-istoj kaj organizoj en kaj eksterlandaj; partopreni diversajn kongresojn. La adreso: Esperanto-Societo "Teslić", Poŝta kesto 22, YU-74270 Teslić, Respubliko Serba. (G. Kragić)

● S-ino Birthe Lapenna prelegos en la Internacia Esperanto-Konferenco '95 (IEK) pri la ĉeftemo: Vivo kaj Verko de Ivo Lapenna (1909-1987). IEK '95 okazos 15-21 julio de 1995 en Varsovio de Pollando. Post la morto de Zamenhof, tre malmulte da homoj havis fidon, fervoron, energion kompareblajn al la liaj. Ivo Lapenna estis unu el ili. Tiuj, kiuj pli bone konis lin kaj liajn verkojn, revivigos en Varsovio la humanismon de Lapenna por la aliaj. Informoj ĉe: Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77 m. 137, PL-01865 Warszawa, Pollando.

● Bonvolu sendi esperantaĵojn, librojn, biletojn, regionajn memoraĵojn al Luis Felipe Saldarriaga, Apartado 5567, Medellin, Colombia, kaj rekompence vi ricevos kolombian Esperanto-eldonaĵon kiel donacon.

● Turisma Oficejo "NOV-TUR" kaj Rondo de Pola Esperanto-Asocio en Andrychow invitas vin post la 80-a Universala Kongreso de Esperanto (Tamperoo, Finnlando) al Pollando por partopreno en Beskidmontara Turisma E-Renkontiĝo (BTER '95), kiu okazos inter la 2-a kaj 8-a de aŭgusto 1995. Aliĝo ĉe: "NOV-TUR" Turisma Oficejo, str. Wloknarzy 22, P.O. Kesto 30, PL-34120, Andrychow, Pollando.

(Renata Marta Nowak)

E Dank' al propono de Grete Häusler, gvidantino de la 20 000-persona Amikaro Bruno Gröning, lerni la internacian lingvon, nun 50 amikoj komencis lernadon. Kvankam la Amikaro okupiĝas pri saniĝado per spiritaj fortoj, la ĝisnunaj rezultoj per Esperanto konvinkis ĉiujn amikojn pri ties valoro. Per Esperanto ekzistas kontaktoj kun 45 landoj el ĉiuj kontinentoj. Post la kurso la novaj esperantistoj volas subteni la E-laboron en la Amikaro kaj ankaŭ raporti pri siaj saniĝoj en Esperanto. (Detlef Meier)

● Esperantaj Tagoj de Krakovo okazis 10-11 decembro 1994. Partoprenis ĉ. 50 gesamideanoj ĉefe el Krakovo, sed ankaŭ el Staszow, Gliwice, Poznan kaj aliaj polaj urboj. Okazis koncerto de la ensemblo "Kamea", prelegoj, prezento de versaĵo ktp.

(A. Sochacki)

En Esperantaj Tagoj de Krakovo







La aŭtoro (maldekstre) kaj s-ro Chen Shide (la dua de maldekstre) en 1993

SHI CHENGTAI:

## Saluton, “El Popola Ĉinio”!

**S**E temas pri la gazeto “El Popola Ĉinio”, mi certe volas diri multon.

Mi sciis la nomon de EPC, antaŭ ol mi komencis lerni la lingvon Esperanto. En 1956 aŭ 1957, kiam mi legis artikolon de Chen Yuan pri Esperanto en la gazeto “La Monda Scio”, tiu artefarita “internacia helpa lingvo” tuj interesis min, mezlernejanon, kaj konigis al mi la nomon de EPC. Nur poste mi korespondis kun iu funkciulo de la Ĉina Esperanto-Ligo (ankaŭ poste mi sciis, ke tiu ja estas nia estimata pioniro Zensho), kiu sendis al mi mimeografitan lernolibron de Esperanto, kompilitan de s-ano Venlo Fon. Mi eklernis la lingvon.

Mia lernado estis hasta vorado eble pro tio, ke mi jam lernis la rusan lingvon, mi nur uzis du monatojn por fini la 24 lecionojn de tiu lernolibro, kiu nun estas kultata sur mia librobreto, kiel rara historia objekto por mi. Post la ellerno de la lernolibro mi arogante deziris legi ion en Esperanto. Kion do legi? Unue mi rememoris “El Popola Ĉinio”. Tamen mia kara panjo, instruistino, lukris povran salajron, kiu vivtenis familion kun 5 membroj, ne kapablis aboni por mi tiun gazeton... Sed hazarde, tiam lumo helis al mi, ke en ŝia lernejo iu nova juna kolego estis esperantisto nomata Ge, kiu abonis la gazeton. Panjo petis de li prunti la gazeton kaj vortaron al mi, s-ano Ge tuj konsentis. Tamen, ho ve,

kiam mi malfermis la gazeton, eĉ unu mallongan alineon mi ne povis kompreni. Mi sciis, ke de mi posedataj vortoj estas tro multaj. Sed mi ne deprimiĝis, kaj mi foliumis plu. Subite kun ekstazo mi trovis sur la lastaj paĝoj de ĉiu numero la rubrikon “Post la Kurso”, en kiu mi povis jam ĝui plezuron de legado! Tiel, kiel bovo trovis herbojn, mi maĉis ĉiujn frazojn en tiu rubriko, pere de la notoj...

Jam estis 1962, kiam mi aĉetis etan Esp-ĉinan vortaron, kompilitan de ĈEL kaj Esperantan kres-tomation kun notoj de Tikos, mi tiam jam kapablis pasi facile tra la legada pasejo.

Poste mi mem perlaboris kaj abonis EPC. Jam estis 1964. Mi

# La kvina konkurso de EPĈ- legado finita

Nun finiĝis la kvina konkurso de EPĈ-legado, komencita novembre de 1994. Ĝin partoprenis 54 legantoj el 17 landoj, inter kiuj 34 ĝuste respondis ĉiujn demandojn. La partoprenantoj el Rumanio, Jugoslavio, Rusio kaj Francio estis kompare multaj.

Post lotumo ni anoncas, ke la unuagradan premion gajnis CLARY FRANCOISE el Francio, kiu ricevos brokatan tablotukon. La dua gradan premion gajnis TOMISLAV MITROVIĈ, SINIŠA VELIĈKOVIĈ (Jugoslavio), VLADIMIR VYĈEGJANIN, OLEG VASILJEV (Rusio), ISAMU ITO (Japanio), ANE MEMOLERA (Hispanio), ADA CANNATA TUMMINELLI (Italio), CHARLES-RENÉ COULARIS (Francio), MANDITA IACOB (Nederlando), SUZANNA BARABÁS, TÖRÖK RÉKA, ERIKA GERGELY (Rumanio), kiuj ricevos po unu T-ĉemizon kun la vortoj "El Popola Ĉinio". Ni sendos po unu Esperantan libron al tiuj, kiuj ne gajnis pre-

mion sed ĝuste respondis ĉiujn demandojn.

La ĝustaj solvoj estas jene (ciferoj en paren-tezo markas numeron kaj paĝon, en kiuj trov-eblas la ĝusta solvo):

I. 1. v (1-20); 2. v (3-49); 3. × (6-11); 4. × (8-24); 5. v (10-49); 6. v (3-6, tiu ĉi estas iom malsama ol la originala teksto kaj ni ne juĝas pri ĝi).

II. 1. Konfuceo kaj liaj disĉiploj (1-40); 2. 6 (3-7); 3. La Pekin-Jiulong-a Fervojo (4-6); 4. Li Bai (4-20); 5. 40 (6-28); 6. Filatelo (8-18).

Ni daŭre organizos konkurson de EPĈ-legado. Bonvenaj estas viaj konsiloj kaj proponoj, ekz., pri konkursa maniero. Ni esperas, ke pli da legantoj partoprenos en la sesa konkurso de EPĈ-legado, kies demandaron ni aperigos en la novembra numero de 1995.

**La Red.**

lernis esprimojn pri la politika kaj ekonomia vivo en Esperanto. Mi preferis tiujn novelojn aŭ poemojn esperantigitajn de Pandiŝo, S. J. Zee kaj Laŭlum, eble ĝuste ili kondukis min en la palacon de Esp-literaturo. Menciinde, mi ankaŭ foje-refoje legis la tradukitajn poemojn de rusaj aŭtoroj (Katjuŝa de Isakovskij kaj fabelon de M.Gorkij) en iu n-ro. Precipe ravis min la artikolo-serio de Honfan pri vejĉio kaj recenzoj pri libroj en Esperanto. Kvankam mi ne sciopovis ludi vejĉion, nek kapablis aĉeti tiujn librojn, tamen mi plimalpli konis novajn sciojn pere de ĵus posedita lingvo, pro tio mi tre ĝojis.

La tiel nomata kultura revolucio alvenis en la somero de 1966, en tiu jaro mi ricevis nur du numerojn de EPĈ. Mi timis, ke la ĉina Esp-movado stagnos.

Tamen niaj saĝaj samideanoj de EPĈ daŭrigis eldonadon de la

gazeto. Tiel EPĈ helpis min en la lingvo-studado dum tiu terura periodo de dek jaroj. Ĉu mi nun ne devas danki nian karan EPĈ?

Ankaŭ dum tiu periodo mi kontaktiĝis kun EPĈ de la paĝoj al personoj: en 1967 mi vizitis la oficejon de ĈEL, s-ano Zou Guoxiang akceptis min, ne en kabineto, sed ĉe la pordo. Li informis, ke EPĈ daŭras, fariĝas monata... Poste mi kontaktiĝis kun s-ano Tikos, kies instigo ĉiam restos en mia memoro, kaj eĉ nun mi imitas lin por dediĉi min al la movado.

De 1978 nia EPĈ estas pli leĝinda. La politika propagandado iom post iom cedas al raportado pri reala vivo de nia lando, eĉ de simplaj civitanoj. Kaj novaj rubrikoj, ekz. "Ĉina Kulturo", "Esp-Novajtoj" k.a. sinsekve debutis, mi povas uzi ilin por akiri pli da scioj kaj levi esprimkapablon en la lingvo. Eĉ poste mi provis verki en Esperanto.

En la 90-aj jaroj la juna redaktoro s-ano Wang Hanping vizitis min en mia hejmo fore de Pekino, tio intimigis min kun la gazeto. Ankaŭ mi de leganto feliĉe fariĝis aŭtoro de EPĈ: Wang petis min verki ion por la nove kreita rubriko "Voĉo de E-istoj", tiel mia artikolo unuafoje havis honoron aperi sur la paĝo de EPĈ, kaj mi ankaŭ kontribuis al la gazeto recenzon pri valora libro de B. Vogelmann, eĉ por la freŝa rubriko "Originale Verkitaĵoj" mi sendis novelon el mia Kiso-serio kaj poemojn de Ĉinesko, ĉu tiuj meritoj aperon sur la karaj paĝoj aŭ ne? Mi ne scias...

Tamen mi diras la veron, ke mi tre amas EPĈ, dum ĝia 45-jara jubileo mi volas esprimi mian elkoran gratulon al ĝi.

Mi kredas, ke EPĈ certe posedos pli maturan vervan vivon.

Saluton, "El Popola Ĉinio"! ■

# ELLERNU MEMAMON

**M**I aŭskultis rakonton, ke iu afabla s-ro skribis al sia filino amleteron en la nomo de ŝia kunlernanto, por vekii ŝian kuraĝon alfronti la sorton. La rakonto kortuŝis min kaj pensigis al mi: ĉu la homoj estas tiel malfortaj, ke ili bezonas alies lingvon kaj senton por taksii kaj ami sin mem? Se iutage neniu prizorgos, defendos, kuraĝigos ilin — certe tio okazos — kion ili povos fari?

Mi klare memoras malfeliĉan pasintaĵon de iu maljuna muzikisto. Li estis maljuste elpelita en kamparon kaj tie li tranĉadis furaĝon dum 7 jaroj. Poste li revenis en la urbon kaj oni mire trovis, ke li neniom maljuniĝis aspekte. Li ridis: “Kiel mi povus maljuniĝi? Mi tranĉadis furaĝon ĉiam laŭ la takto 4/4.” Li ja bone scias ami sin.

Mi bone memoras ankaŭ elstaran pianistinon. Ŝi ne estis nememama, sed tro memama. Muziko faris ŝin gracia kaj ĉarma, sed kiam beleco estis surtretita, ŝi pereigis sin mem.

Kial ne ellerni memamon?

Memamo ne estas sinindulgo nek senbridigo. Ĝi signifas oftan singustigon kaj sinkorekton. Multajn fojojn dum nia vivo ni vivas sen kuraĝigo, gvido, admono de aliuloj, eĉ niaj plej karaj gepatroj kaj plej sinceraj amikoj ne povas ĉiam esti apud ni, kaj en ĉiu ajn tempo ni povas perdi la amon kaj kareson,



kiujn ni ĝuas. Kaj pro tio ni devas ellerni memamon por ne fariĝi herbo ŝanceliĝanta en vento, sed fariĝi forta prospera arbo.

Ni ellernu memamon. Tio signifas, ke ni devas ellerni donaci al ni mem faskon da freŝaj floroj kaj serenajn rideton, kiam ni bezonas iri en nigra pluva nokto kaj elteni malfacilojn en la vivo, dum neniu povas doni al ni helpon. Poste ni bonvenigu ĉiun novan matenon, kun bela deziro vivi plu. Eble iuj rigardas tion memtrompon. Sed kial

rifuzi portempan memtrompon, se ĝi donas longan realan feliĉon?

Ellerno de memamo fontas el domaĝo al la vivo. Ĝi faras nian vivon pli signifoplena kaj pli sana kaj nian animon pli libera kaj pli pura. Ni povas konstrui nian propran palacon kaj fari nin mastro de nia propra spirita ĝardeno, kiam ni ne havas domon.

Oni povos ami la tutan mondon, nur post kiam oni ellernos ami sin mem. ■



# Por elliberigi sin el malriĉeco

de WANG XIN

**L**AŬ statistiko, en 1978 estis ĉ. 250 milionoj da malriĉaj kamparanoj en Ĉinio, kiuj konsistigis pli ol trionon de la totala kampara loĝantaro. Poste, dank' al la reformado de la ĉina ekonomia sistemo, la kampara ekonomio radikale ŝanĝiĝis, kaj evidente pliboniĝis la vivstato de la kamparanoj. En 1985 la nombro de malriĉaj kamparanoj reduktiĝis al 125 milionoj. Laŭ la takso far la ĉina registaro lastatempe, nun en Ĉinio estas 80 milionoj da malriĉaj kamparanoj.

En la komenco de la 80-aj jaroj Ĉinio difinis pokapan jaran enspezon de malpli ol 200 juanoj kiel la normon de malriĉeco. En la komenco de la 90-aj jaroj, pro prezaltiĝo, la 200 juanoj jam ne sufiĉis por minimuma vivteno, kaj la nova normo de malriĉeco estas la pokapa jara enspezo de malpli ol 320 juanoj. La nombro de la ĉinaj malriĉuloj estis taksita laŭ tiu normo. Se taksate laŭ la normo de pokapa jara enspezo de 370 usonaj dolaroj difinita de la Monda Banko, do la nombro de ĉinaj malriĉuloj multe superas 80 milionojn.

La malriĉaj kamparanoj en Ĉinio plejparte loĝas en sudokcidenta kaj nordokcidenta Ĉinio kaj montaroj de aliaj regionoj. La malriĉeco de tiuj regionoj karakteriziĝas per jenaj trajtoj: Unue, la malriĉaj loĝantoj lokiĝas pli kaj pli dise. En la 80-aj jaroj la malriĉaj gubernioj konfirmitaj de la ŝtato havis pli ol 80% de la malriĉuloj de Ĉinio, kaj nun la malriĉaj loĝantoj dense loĝas en malproksima kamparo; due, estas des pli malfacile elliberigi sin el malriĉeco. Iuj lokoj kun relative bonaj kondiĉoj jam sin elliberigis el malriĉeco post kelkara penado, kaj la restaj malriĉuloj plejparte loĝas en montregionoj kun malbonaj naturaj kaj soci-ekonomiaj kondiĉoj; trie, pro naturaj katastrofoj en la regionoj, jam elliberigitaj el malriĉeco, kaŭze de malfortaj fundamentaj instalaĵoj, 10-20% de la loĝantoj denove dronis en malriĉeco; kvare, ne radikale ŝanĝiĝis la postĝinta fizionomio de produktado kaj vivo. Nun mankas trinkakvo al pli ol 45 milionoj da loĝantoj kaj pli ol 30 milionoj da brutoj en la malriĉaj regionoj, 35% de la malriĉuloj estas analfabetoj kaj duonanalfabetoj, al 1 700 *ŝjang*-oj (administra unuo, kiu egalas distrikton aŭ subdistrikton en la ĉinaj kamparoj) de la malriĉaj regionoj ne kondukas aŭtovojoj kaj 108 000

vilagoj ne havas telefonon.

La ĉina registaro ĉiam prenas la batalon kontraŭ malriĉeco kiel sian gravan taskon. Ĉinio organize, laŭplane kaj klarcele komencis tiun laboron en la mezo de la 80-aj jaroj. En 1980 la ŝtato oficiale starigis disvolvan fonduson en sia financa budĝeto. por subteni la subevoluintajn regionojn. En la sekvintaj 15 jaroj la ŝtato elspezis sume 27 miliardojn da juanoj por helpi malriĉulojn de 1 410 gubernioj. En 1993 la ĉina registaro ellaboris "Ŝtatan planon por helpi la 80 milionojn da malriĉulojn en 7 jaroj". La plano prezentis, ke Ĉinio solvos la problemon pri vivteno por la 80 milionoj da malriĉuloj en la lastaj 7 jaroj de la kuranta jarcento. Por efektiviĝi la celon, la ĉina registaro klare difinis konkretajn taskojn kaj rimedojn en la plano.

— La pokapa jara enspezo de plejparto de la malriĉuloj superu 500 juanojn.

— Plibonigi la medion de fundamentaj instalaĵoj en la malriĉaj regionoj; fundamente solvi la problemon pri trinkakvo por homoj kaj brutoj; konstrui ŝoseojn en plejparto de la malriĉaj subdistriktoj kaj liveri elektron al tiuj lokoj.

— Ŝanĝi la postĝintan staton de kulturo, edukado kaj higieno, popularigi fundamentan edukadon, fundamente elimini analfabetecon de 30-40-jaruloj, disvolvi plenkreskulan edukadon kaj instruon de profesiaj teknikoj, preventi kaj elimili endemiojn.

La ĉina registaro ellaboris ankaŭ novajn politikojn. Ili estas: Unue, grandigi la investon por la malriĉaj regionoj; due, praktiki la orientilon helpi la malriĉajn regionojn en ekspluatado de lokaj riĉfontoj. Antaŭe, la ŝtato helpis la malriĉajn regionojn nur per greno kaj mono, kio ne povis radikale liberigi la lokojn el mizero. En la lastaj jaroj la ŝtato iom post iom modifis sian metodon cele radikale elimini la malriĉecon, t.e., utiligante kaj disvolvante naturajn riĉfontojn de la malriĉaj regionoj, oni starigas fundamentajn instalaĵojn kaj disvolvajn industriojn por iom post iom plibonigi la ekonomian disvolvan medion, formi memakumulan povon kaj fine suriri la riĉigan vojon per siaj propraj fortoj; trie, praktiki favorajn politikojn por helpi la ekonomian disvolvon de la malriĉaj regionoj. En la lastaj jaroj la ŝtato speciale substrekis, ke la disvolviĝintaj regionoj en orienta Ĉinio helpu la malriĉajn regionojn en konstruo de industriaj entreprenoj.

La plano "Per laborigo helpi malriĉulojn" estas grava rimedo por pliiĝi la fundamentajn instalaĵojn por malriĉaj regionoj. Tio komenciĝis de konstruado de ŝoseoj, starigo de akvoutiligaj konstruoj kaj instalaĵoj de trinkakvo por homoj kaj brutoj. Tio ne nur plibonigis la medion de produktado kaj vivo kaj kreis kondiĉojn por ekonomia kresko, sed ankaŭ donis laborŝancon al taglaboristoj. ■

# Febra lernado de aŭtostirado en Pekino

Teksto kaj fotoj de DA WEI




En simulejo

Pekino estas konata kiel regno de bicikloj. Tamen lastjare multaj pekinanoj konkure vizitas lernejon de aŭtostirado. Sekve de tio, la nombro de diversaj tiaj lernejoj kreskis de dekoj en la komenco de la 90-aj jaroj al pli ol 200, kiuj ĉiujare elbakas pli ol 200 mil aŭtostiristojn.

Kio kaŭzis tiun febron? S-ro Hou, vicdirektoro de la Lernejo de Toyota-stiristoj sub la Ĉefurba Aŭto-grupo, diris, ke antaŭ kelkaj jaroj oni lernis aŭtostiradon por serĉi vivrimedojn, sed nun la lernantoj plejparte estas profesiuloj, kiaj bankistoj, estroj de entreprenoj, direktoroj de kompanioj, ĵurnalistoj kaj aktoroj. Ĉar pli kaj pli multaj konsciis, ke pli da kapabloj havigas pli da ŝancoj por partopreni en la socia konkuro, kaj tion postulas ankaŭ la disvolviĝo de la epoko.

Iuj opinias, ke la nombro de stirlernejoj en Pekino jam atingis sian kulminon kaj ili alfrontos intensan konkuron inter si por ekzisto, tamen daŭros la febro por lernado de aŭtostirado. La nunaj pekinanoj strebas por fariĝi multkapablaj kaj adaptiĝemaj al la estonteco.


Instruisto konigas aŭtomekanismon.





En lernejo de aŭtostirado

Simula stirado



Proveturado inter fostoj





# REGIONO SOPIRATA

de ZHENG ZHENJIE

**L**A regiono ĉirkaŭ Bohai-marŝo estas abunda je turismaj lokoj. 4 el la 6 ĉinaj historiaj restaĵoj kaj vidindejoj enlistigitaj de Unesko en Katalogon de Mondaj Heredaĵoj troviĝas en tiu regiono. Ili estas la Imperiestra Palaco de Pekino, Ruino de Pekinaj Simihomoj, Granda Muro kaj Taishan-monto. El la 50 turismaj itineroj deciditaj de la Ĉina Internacia Turisma Servo en 1994 13 funkcias en la nomita regiono.

## PEKINO KAJ LA GRANDA MURO

Kun historio de 3 000 jaroj, Pekino funkciis kiel ĉefurbo de la dinastioj Liao, Jin, Yuan, Ming kaj Qing dum ĉ. 1 000 jaroj. Tial en Pekino estas granda nombro da historiaj objektoj, kiaj la Imperiestra Palaco, kie loĝis kaj regis imperiestroj, la Ĉiela kaj Tera Altaroj, kie imperiestroj kaj iliaj familianoj kultis la Ĉielon kaj Teron por prospero kaj paco de la lando, pitoreskaj imperiestraj ĝardenoj — Beihai kaj la Somera Palaco, cerva ĝardeno, kie ĉasis imperiestroj, kaj imperiestra somerumejo. Ĉu pala-coj kaj ĝardenoj, ĉu pavilonoj kaj kioskoj, ĉu imperiestraj maŭzoleoj, ĉiuj estas imponaj kaj luksaj.

La imperiestroj malaperis jam antaŭ longe, sed ilia loĝloko tre interesis turistojn el diversaj landoj kaj regionoj. Laŭ la turisma itinero la turistoj povas viziti imperiestran palacon, sperti la pompecon de imperiestra vojaĝo, preni imperiestrajn manĝaĵojn, surmeti la vestojn de imperiestroj aŭ tiujn de iliaj edzinoj.

Ankaŭ la Granda Muro estas grava turisma loko en la regiono ĉirkaŭ Bohai-marŝo, ĉar tie troviĝas Shanhai-pasejo, Badaling kaj aliaj imponaj partoj de la Granda Muro.

Mi plurfoje ascendis la supron de Badaling, je pli ol mil m. super la marnivelo laŭ krutaj ŝtuparoj. La surfaco de la muro estis konstruita el ŝtonblokoj, ĉiu peza je pli ol mil kg. Ĝi estas alta kaj fortika. Kiel oni siatempe transportis ilin sur la supron de la montoj sen avangarda transportilo?

Tio restas enigmo eĉ nun.


Shanhai-pasejo estas fama tra la tuta mondo. Sude de ĝi sterniĝas senlima Bohai-marŝo, ĝis kies bordo etendiĝas la Granda Muro. Norde de ĝi majestas Jiaoshan-monto, de kies pinto la Granda Muro serpentumas foren en montaro.

## KONFUCEO KAJ KAJTO

Antaŭ dekkelkaj jaroj, kiam la pordo de Ĉinio restis fermita, en la okuloj de la ordinaraj ĉinoj, kompreneble inkl. de la loĝantoj de la regiono ĉirkaŭ Bohai-marŝo, turisma afero estis tute ne grava.

Ni prenu Shandong-provincon kiel ekzemplon. Ĉi tie ne nur imponas Taishan-monto, sed ankaŭ belas ĉemara urbo Qingdao, famas Qufu, hejmloko de Konfuceo (551-479 a.K.), fama pensulo kaj edukisto en la antikva Ĉinio. Sed neniu atendis, ke la turisma afero de Shandong disvolviĝis unue ne en

## Skema mapo de lokoj de la regiono



tiuj lokoj, sed en nekonata malgranda urbo Weifang. Tiam en Weifang nur unu objekto iom rilatis al turismo, ĝi estas kajto, kiu havas longan historion en Weifang. En Yanjiapuvilaĝo de Weifang ĉiuj familioj lertas en kajtofarado. Post kiam Ĉinio ekpraktikis la pordmalferman politikon, Weifang-anoj volis, ke iliaj kajtoj flugu pli alten kaj pli foren. En 1984, Weifang-anoj unuafoje okazigis kun sukceso la Festivalon de Kajtoj. La festivalo venigis ne nur diverslandajn amatorojn de kajtoj, sed ankaŭ multajn komercistojn kaj entreprenistojn. Tio alportis al Weifang konsiderindan ekonomian efikon. La kajto de Weifang vere ekflugis.


La ago de Weifang-anoj montris al la ĉinoj, kio estas turismo kaj kiel disvolvi ĝin. Por disvolvi turismon estas bezonata ne nur turisma kondiĉo, sed ankaŭ kreiveco. Sen supereco de turismaj kondiĉoj, Weifang-anoj rapide disvolvis sian turisman servon pere de malgrandaj kajtoj.

Post la unua Festivalo de Kajtoj en Weifang aperis en Shandong kaj aliaj lokoj de la tuta lando diversaj festivaloj, kiaj festivaloj de fiŝistoj, persikoj, vinberoj kaj narcisoj. Samtempe kun tio disvolviĝis iom post iom turismaj aferoj en aliaj lokoj de la regiono ĉirkaŭ Bohai-marĉo kaj formiĝis turismaj itineroj kun lokaj koloroj. Inter ili estas turisma itinero por sperti popolajn morojn en Weifang, vojaĝoj tra pekinaj stratetoj, vizito al hejmloko de Konfuceo Quju, *ĉigong*-saniga vojaĝo en Beidaihe, vojaĝo sur mongola stepo ktp. Ĉiuj tiuj vojaĝoj donas al turistoj bonan ŝancon koni la vivon de ordinaraj ĉinoj kaj antikvan historion kaj kulturon de Ĉinio.

### HOTELOJ KAJ ĈIĈERONOJ

En la regiono ĉirkaŭ Bohai-marĉo la turismaj aferoj senĉese disvolviĝis lastajn jarojn. Ekz., de la turismaj aferoj Pekino enspezis 46.9 miliardojn da juanoj en 1994 kaj ĝi akceptis 2.03 milionojn da alilandaj turistoj.

La vigliĝo de turisma afero akcelis la disvolviĝon de loka ekonomio. Antaŭ dekkelkaj jaroj, en Pekino preskaŭ ne videblis luksaj hoteloj, sed dank' al disvolviĝo de la turisma afero, grandaj etaĝdomoj leviĝis unu post alia. En Pekino nun funkcias 35 bele dekoritaj kaj bone instalitaj hoteloj kun kvar kaj kvin steloj. Por ke la turisma servado fariĝu pli kontentiga, la pekina turisma departemento donas grandan atenton al la trejnado de servistoj kaj kulturo de ilia amo al la profesio.



La fama turisma loko Penglai-pavilono

Foto de HAN HONG

Vizitante Qufu en Shandong-provinco, mi havis la feliĉon spekti la grandiozan ceremonion kulti Konfuceon. Ĝia grandiozeco kaj la agrabla antikva melodio profunde impresis min. Ankaŭ hoteloj kaj ĉiĉeronoj de Qufu estas por mi neforgeseblaj. Oni povas diri, ke Queli-hotelo de Qufu havas apartan stilon. Ĝi similas al ĝardeno kun delikata strukturo interne. Ĝiaj ĉambroj ĉefe kun bambuaj mebloj estas komfortaj. La hotelo elspiras antikvajn trajtojn kaj orientan etoson.

Nia ĉiĉeronino estis bela knabino. Ŝi diris al mi, ke ŝi naskiĝis en proksima kamparo. Fininte la lernadon, ŝi eklaboris kiel ĉiĉeronino. Nun ĉiutage ŝi gvidas turistojn en vizito de la Loĝejo de Posteuloj de Konfuceo. Ŝi bone konas la anekdotojn en tiu granda loĝejo kaj bele rakontas ilin.

Sur la strato ekster la Loĝejo de Posteuloj de Konfuceo staras multaj eksponbudoj. La strato estas nelarĝa, sed tre vigla, precipe en turismaj sezonoj. En budoj vendiĝas T-formaj ĉemizoj, ĉapeloj, poŝtkartoj kaj libroj pri Konfuceo, diversaj braceletoj, kolieroj, budhaj statuoj ktp. Laboranto de la loka turisma servo sciigis al mi, ke la strato estis kvieta antaŭe, nur dank' al vigliĝo de turismo, la tieaj kamparanoj kaj aliaj loĝantoj starigis budojn kaj fariĝis etkomercistoj. Nun ili lerte ofertas en fremdaj lingvoj komercaĵojn kaj pro tio ili vivas bonhavan vivon.

### EPILOGO

Nia rubriko raportis nur parton de nia vizito de la regiono ĉirkaŭ Bohai-marĉo. Adiaŭante la rubrikon, ni volas diri, ke niaj legantoj estas ĉiam bonvenaj en la regiono, ĉu pro turismo ĉu pro partopreno en la tiea ekonomia aktivado. ■



Turistoj en kostumoj de imperiestro, lia edzino kaj iliaj servistinoj

Foto de **REN YING**



Ĉe maro

Foto de **LI CHANGJIE**





# REGIONO ĈIRKAŬ BOHAI-MARO



Kulta ceremonio en la Templo de Konfuceo  
Foto de **SUN YIFU**



Aĉeto de memoraĵoj

Foto de **YAN JIN**



Alilandaj turistoj ĉe la Granda Muro

Foto de **REN YING**





S-ino Bai Zhen

**T**IBETO estas antikva kaj mistera loko. Ĉio, kio okazis sur la neĝkovrita altebenaĵo, ĉiam interesis la mondon per sia ĉarmeco. Kion do rakontos nun al ni la tibetanoj, kiuj spertis ĉion ĉi tion, ĉe la sojlo de la 30-jariĝo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono? Jen ili diris:

### **“ESTAS ĈIO, KION ONI DEZIRAS MANĜI”**

Hano Tang Jisheng naskiĝis en Anhui provinco. Li venis al Tibeto en 1979 kaj nun laboras en la redakcio de “Tibeta Ĵurnalo”. Li diris:

“Kiam mi venis al Tibeto en 1979, en Lhasa ne troveblis eĉ biskvito. Mi neniel alkutimiĝis al la manĝo sen legomoj. Foje mia amiko donacis al mi tufon da legomoj kulturitaj en forcejo. Mi manĝis ne nur iliajn freŝajn foliojn, sed ankaŭ iliajn radikojn. En tiu tempo mi deziris manĝi legomon eĉ en songo. Kaj ĉiufoje, fininte la feriojn en la landinterno, mi revenis al Tibeto kun multe da legomoj kaj fruktoj.

“Nun la magazenoj de Lhasa abundas je varoj, ĉu manĝaĵoj ĉu vestaĵoj, produktitaj de diversaj lokoj de Ĉinio. En la urbo vendiĝas diversaj fruktoj, kiaj pomo, oranĝo, banano kaj akvomelono, tra la jaro. En Lhasa servas multe da restoracioj grandaj kaj malgrandaj. Ankaŭ tibetanoj frekventas restoracion kun siaj familianoj, kiel landinternuloj. Multiĝas manĝaĵ-specoj de la tibetanoj. Ekz., ili manĝis testudon neniam antaŭe, ĉar ili malofte vidis ĝin. Nun bone sciante ĝian tonikecon, pli kaj pli multaj manĝas ĝin. Iuj eĉ pendigis ĝian ŝelon en sia hejmo kiel ornamaĵon.

HU YUN:

# Tibetanoj pri Tibeto

“En 1979, kiam mi venis al Lhasa, ĉie vidiĝis tervojtoj kaj kabanoj. En la lastaj jaroj tie aperis asfaltitaj vojoj, novaj domoj kaj altklasaj hoteloj, kaj krome, ĉiuj familioj uzas gason.”

### **“ĈIUJ INFANOJ POVAS VIZITI LERNEJON”**

Tibetano Bai Zhen, estro de la Unua Elementa Lernejo de Lhasa, diris:

“Nia lernejo, la unua publika elementa lernejo en Tibeto, fondiĝis en 1952. Antaŭ tio, ĉiuj lernejoj en Tibeto estis privataj kaj postulis altan lernopagon. Nur la infanoj de aristokratoj povis lerni en ili. Post kiam ekfunkciis la publika elementa lernejo, la infanoj de malriĉaj familioj, kiel mi, ekhavis la ŝancon lerni. Mi fariĝis lernanto de la Unua Elementa Lernejo de Lhasa. Malfeliĉe, miaj gepatroj forpasis kaj mi devis forlasi la lernejon kaj fariĝis sklavo de iu feŭdulo. La sklavoj, plej mizeraj en la socio, ne havis personan liberon. Post la demokratia reformado en Tibeto en 1959 min fortunis la ŝanco denove viziti lernejon. Mi estis sendita lerni en la landinterno. Post 4-jara lernado mi revenis al Lhasa kaj eklaboris kiel instruistino en la Unua Elementa Lernejo de Lhasa.

“En la pasintaj 30 jaroj mi instruis la hanlingvan fonetikan alfabeton kaj muzikon. Mi propraokule vidis, kiel rapide disvolviĝis mia lernejo. En la komenco la lernejo kun granda korto havis dekkelkajn klasĉambrojn kun pli ol 300 lernantoj. Nun la korto de la lernejo malgrandiĝis, tamen domoj multiĝis. La lernejo havas tri instru-domojn, unu telefon-instruan domon kaj unu in-





En legombazaro de Lhasa

struistan domon, ĉ. 2 500 lernantojn kaj 156 instruistojn, el kiuj 80% estas tibetanoj.

“En Lhasa ĉiuj lernoĝaj infanoj povas viziti lernejon. Eĉ la nelegipovaj gepatroj deziras, ke iliaj infanoj vizitu lernejon kaj estu klerigitaj. Kiel ajn malfacila estas ilia vivo, ili sendas siajn infanojn al lernejo. En Lhasa funkcias sep elementaj lernejoj, tamen multaj gepatroj deziras, ke iliaj infanoj povu lerni en la Unua Elementa Lernejo. Ĉar multaj el ili diplomitiĝis el la lernejo kaj havas por ĝi grandan simpatian. Krome, la lernejo estas bone instalita kaj alte taksas la instruon kvaliton.


“La lernejo funkciigas 42 klasojn, 16 el kiuj estas destinitaj por instrui per la lingvoj hana kaj tibeta. En iuj klasoj oni donas lecionon per handlingo kaj en la aliaj per la tibeta lingvo. Ĉiuj instruistoj tre atentigas vivigi sian instru-metodon.”

### **“KONSTRUU PLI DA AKVOKONSERVEJOJ KAJ ELEKTREJOJ”**

Tibetano Xiangba Pingcuo vivis en multaj lokoj de Tibeto kaj nun funkcias kiel ataŝeo de la Shannan-a Subregiona Administrejo. Li diris:

“Shannan distancas de Lhasa je 200 km, kie kuŝas Gonggara-aerodromo konstruita antaŭ nelonge. Kun 300 000 loĝantoj kaj areo de 30 000 hektaroj da kampoj Shannan estas unu el la lokoj kun bonaj naturkondiĉoj en Tibeto.

“La konstruo ĉe la riveroj Yarlung Zangbo, Lhasa kaj Nianchu koncernas 18 guberniojn, el kiuj kvin estas en Shannan. La konstruo celas ĉefe solvi la problemon pri akvo. Shannan estas agrikultura regiono. Tie la kampoj estas pli alte super la marnivelo kaj la riveroj en profundaj montvaloj. Tial la akvomanko fariĝis la ĉefa faktoro malhelpi la agrikulturan disvolviĝon. Sekve, oni




La hidroelektrajo Yarzhoyum Co en konstruado

komencis konstrui akvokonservejojn kaj pumpstaciojn por konduki akvon supren. Iuj el ili finkonstruiĝis kaj aliaj estas konstruataj.

“La jam konstruita akvokonservejo Jiaripu ludis gravan rolon en la batalo kontraŭ trosekeco en 1993. Tiujare la produktokvanto de greno reduktiĝis en la tuta regiono. Nur en la loko, kie sidas la akvokonservejo, la produktokvanto de greno pliiĝis je 500 000 kg. En 1994 Tibeto ricevis la plej bonan rikolton de agrikulturo en la historio. Tion favoris krom vetero ankaŭ la konstruo. Nun Shannan investis 62 milionojn da juanoj por konstrui Qiongguo-akvokonservejojn. Post sia finkonstruiĝo ĝi povos irigacii ĉ. 5 000 hektarojn da kampoj.

“La naturaj katastrofoj, kiaj trosekeco kaj neĝego, ankoraŭ minacas la tibetan agrikulturon kaj brutobredadon. Por fortigi sian povon batali kontraŭ naturaj katastrofoj, oni devas pliiĝi fonduson por agrikulturo kaj konstruado de fundamentaj instalaĵoj. Ĝuste por tiu celo oni entreprenas la konstruon. Lastjare, la ĉina registaro okazigis la Trian Laborkunvenon de Tibeto, en kiu oni decidis fari 62 projektojn, pri kies konstruado respondecas diversaj provincoj kaj aŭtonomaj regionoj. Ili plejparte estas fundamentaj konstruoj por vojo, energio kaj irigacio. En Shannan, krom la elektrajo Woka investita de la ŝtato, estas ankaŭ la elektrajo Cuomei kaj lernejoj, pri kies konstruado respondecas la provincoj Hubei kaj Hunan. Ambaŭ provincoj ĝemeliĝis kun Shannan. Ĉ. cent teknikistoj de la provincoj venos al Shannan por helpi ĝin. Ankaŭ niaj kadroj venos tien por fari kunlaboron. La nuna tasko ĉefe estas konstrui pli da vojoj kaj ekspluati minojn kaj fotokablan telekomunikadon. Estonte ni starigos doganojn por fari negocon kun najbaraj landoj. Tiam en ĝi estos memsufiĉaj greno, nutra oleo kaj viando, kaj funkcios bazoj de komercaĵa greno, legomoj k.a.”





ĜENROJ DE NACIMALPLIMULTOJ

# Ji-nacio, adoranto de fajro

Fotoj de ZHOU ZHONGYAO

Forpelo de fiinsektoj per torĉoj por akiri riĉan rikolton

Ji-a maljunulino ripozanta sur fajrolito



Eke de fajrofarado per lignoborado la homaro paŝo post paŝo puŝadis sin al civilizita socio. Oni multe notis pri fajro-totemo de antikvaj klanoj. La tri milionoj da ji-oj en la montaroj Ailao kaj Wumeng en la mezo de Yunnan-provinco nun ankoraŭ konservas la tradicion de fajroadorado. Ili produktado, vivo, kutimo kaj kulturo strikte ligiĝas kun fajro.

Por ji-oj fajro estas simbolo de feliĉo. Ili ŝatas danci kun torĉo. La ji-aj virinoj ŝatas porti ĉapon kun fajrofloro kaj la ji-aj maljunuloj ŝatas ripozi sur fajrolito. En somero estas la Torĉa Festo. Pri la deveno de la festo estas mito. En la antikveco luktis la ĉiela atleto kaj la surtera atleto kaj malvenkis la ĉiela atleto. Li ellasis fiinsektojn por detruigi la grenplantojn. La ji-oj forpelis la fiinsektojn per torĉoj kaj fine akiris riĉan rikolton. La tradicio herediĝis de generacio al generacio kaj fariĝis festo. En tiu tago la ji-oj el ĉiuj vilaĝoj rondiris ĉirkaŭ la kampoj kaj la domoj, kunportante torĉon, kaj poste starigis la torĉojn sur kamp-vojetoj por fortimigi la fiinsektojn. Post la rondirado ili kolektiĝis ĉirkaŭ kamp-fajro, ludis buŝmuzikilojn, drinkadis kaj dancadis tra la tuta nokto.



Ji-a virino en fajroĉapo

Ludo de muzikilo simila al torĉo



Ji-aj infanoj en fajroŝuoj



# KULTO DE OBOJ

**E**N Ĉinio estas tre populara kanto “Renkontiĝo ĉe obo”. La kanto priskribas, kiel iu junulo malpacience atendas sian amatinon en luna nokto ĉe obo sur stepo.

Obo en la mongola lingvo signifas amason kaj multe vidiĝas sur stepo. Oboj povas esti grandaj kaj malgrandaj, ĝenerale ili estas unuopaj, sed troviĝas ankaŭ obaro, kiu konsistas el 7-13 oboj. En la obaro la meza obo, kiel la ĉefa, estas pli granda ol la aliaj. En la ŝtonoza loko ili estas el ŝtonoj kaj en aliaj lokoj el sablotero kun salikobranĉa plektaĵo ĉirkaŭe. Tie la oboj ĝenerale estas rondformaj aŭ supre rondaj kun kvadrata bazo. Ili plejparte troviĝas sur herboriĉaj montetoj. Interne de la obo estas kupra budha statuo aŭ metala spado. Sur ĝia supro staras kelkaj lignaj stangoj kun diverskoloraj silkaj kaj katunaj strioj. Sur iuj el la strioj legiĝas sutraj paragrafoj. Sur la stangoj estas birdformaj ornamaĵoj.

Antaŭe obo funkciis kiel vojmontrilo kaj limfosto. Kaj kun tempopaso ĝi estis rigardata kiel dio por protekti vojaĝantojn kaj gardi la lokan sekurecon. Pro tio kulto de oboj fakte estas tiu de la dioj de la vojo kaj la loko, kaj iom post iom formiĝis tradicia mongola moro — kulto de oboj. Por montri sian respekton al la dioj kaj oportunigi la

kulton, antaŭe gubernioj, distriktoj kaj temploj havis ĉiu sian publikan obon. Riĉaj mongoloj havis sian familian obon. En multaj lokoj estis establaĵo por oboj, kiu respondecis pri imposto-kolektado de la paŝtistoj.

Ĉar ĉiuj gubernioj, distriktoj, temploj kaj urbetoj havas sian propran obon, tial la enhavo, skalo kaj tempo por la obokultado estas malsamaj. Ĝenerale la loĝantoj de diversaj urbetoj kultas obon en la 13-a de la 5-a monato laŭ lun-kalendaro, dum la loĝantoj de diversaj gubernioj ne havas regulan tempon por la kultado kaj la temploj okazigas la kulton en gravaj religiaj ceremonioj.

Kultado de oboj estas duspeca, t.e. privata kaj publika. La privata kulto povas esti okazigata laŭ bezono. Preterirante obon, oni devas deĉevaliĝi kaj piediri, meti ŝtonpecojn aŭ terbulojn sur la obon kaj poste oferi al ĝi monon, viandon aŭ vinon, detranĉi kapharojn kaj vostoharojn de sia ĉevalo, ligi ilin al stangoj aŭ ŝnuroj de la obo kaj surgenuiĝi por peti ĝian benon.

Ĉar la publika kulto en la loko celas peti benon al la loĝantoj kaj brutoj, tial la kulto okazas plejofte en belaj sezonoj somero kaj aŭtuno sur akvoriĉaj herbejoj. Ĝenerale la kulta ceremonio estas grandioza kaj so-

lena. Nun la kulto jam fariĝis grava spektaklo por la stepa turismo.


En la kulta tago la paŝtistoj proksimaj kaj malproksimaj, portante blankan silkan rubandon, buĉitan viktiman ŝafon, buteron, laktaĵojn kaj aliajn oferaĵojn, iras kune kun sia tuta familio al la kulta loko. En la ceremonio oni antaŭ ĉio prezentas blankajn silkajn rubandojn kaj oferaĵojn, kaj post tio lamaoj recitas sutrojn kaj preĝas kaj aliaj ĉeestantoj surgenuiĝas por peti benon, almetas ŝtonojn al obo aŭ riparas ĝin per salikobranĉaj plektaĵoj, ligas al la stangoj novajn diverskolorajn silkajn kaj katunajn rubandojn kaj pendigas religiajn flagojn. Post finiĝo de la ceremonio oni kune trinkas kumison, manĝas ŝafaĵon, laktaĵojn k.a. Oni tiam okazigas ĉevalan vetkuron, sagpafadon kaj lukton kaj premias la venkintojn. Cetere oni faras ankaŭ diversajn amuzajn aktivadojn. La mongola publika kulto de obo estas ne nur solena kulto al dio, sed ankaŭ granda kunveno kaj amuza sportado. Ĝi donas al la dise loĝantaj mongoloj ŝancon por kontaktiĝi kun aliaj, pliigi nacian koheremon. La kultado estas ŝatata precipe de la gejunuloj, ĉar tiam ili povas fari rendevuon kun sia amat(in)o. ■



# Muzeo de Antikvaj Sonoriloj

Teksto de ZHANG HE

Fotoj de LIU SIGONG



Antikva sonorilo

**L**A Templo de Grandaj Sonoriloj en la nordokcidenta antaŭurbo de Pekino estas tre fama antikva konstruaĵo de la jaro 1733. Antaŭe ĝi estis preĝejo de imperiestroj por peti pluvon kaj havis la nomon Juesheng. Poste oni translokis en ĝin gigantan sonorilon kaj la popolo kutime nomis ĝin Templo de Grandaj Sonoriloj.

Nun la templo estas malfermita kiel Muzeo de Antikvaj Sonoriloj. Tie vi povas vidi fajencan sonorilon de la primitiva socio, budhisman sonorilon, sonorilo-reĝon gigantan kiel domo, kaj ankaŭ sonorilon malgrandan kiel glaso, kiun antikvuloj entombigis kune kun la mortintoj.

## SONORILO-REĜO

La sonorilo-reĝo kun diametro de 3.3 metroj altas 6.75 metrojn kaj pezas 46.5 tunojn. Ĝi estis farita en la regperiodo Yongle (1403-1424), 300 jarojn pli frue ol la monda sonorilo-reĝo en Kremlo en Moskvo. La sonorilo el kupro, plumbo kaj aluminio estas tre glata kaj havas neniun makulon. Pli mirinde estas, ke sur la averso kaj verso kaj ekstere de la sonorilo estas 230 miloj da ideogramoj, rekorde en la mondo.

La sono de la sonorilo povas atingi lokon foren je dekoj da kilometroj, kaj ĝia tembro estas distingiga de tiu de aliaj. Akustikaj fakuloj ekzamenis kaj trovis, ke ĝiaj basaj frekvencoj estas tre riĉaj, kaj la sono vibras almenaŭ tri minutojn.

La sonorilo-reĝo pendas sur trabo pere de kupra najlo en longo de 1 metro kaj dikeco de 6 centimetroj. Tie ĝi pendas jam 250 jarojn. Antaŭ 20 jaroj, kiam okazis granda tertremo en Tangshan, proksime de Pekino, knaris la trabo, sed la sonorilego neniom moviĝis.

## DRAKA SONORILO SENDATA

En la muzeo estas antikva sonorilo kun alto de 2.6 metroj kaj pezo de 3 108 kilogramoj. Sur la sonorilo estas multitaj 22 drakoj vigle amuziĝantaj en nubaro. Oni ne scias, kial sur la sonorilo ne estas la dato de la farado. Sed, laŭ la signoj kaj desegnoj de la drakoj iuj fakuloj kredis, ke la sonorilo estis farita antaŭ pli ol 200 jaroj, laŭ la dekreto de imperiestro Qianlong (1736-1795 sur la trono). Iam ĝi pendis sur la tria pordego de la Imperiestra Palaco de Pekino.

## TAOISMA SONORILO KAJ SONORILO KUN DESEĜNOJ DE IMAGITAJ BESTOJ

En la muzeo estas taoisma sonorilo farita antaŭ pli ol 500 jaroj. Sur la supra parto estas taoisma sutro, kaj sur la ŝultroj de la sonorilo estas nomoj de 28 konstelacioj en la ĉina antikva astronomio. Sed la deformitajn ideogramojn sur la malsupra parto neniu povas legi.

La alia mistera sonorilo altas 1.14 metrojn kaj pezas 300 kilogramojn. Sur ĝi estas multitaj imagitaj bestoj ege teruraspektaj. Ĉu ĝi estis uzata kiel amuleto? Kiel oni nomas la strangajn bestojn? Oni atendas solvon.

## EŬROPAJ SONORILOJ

Malsame ol la ĉinaj sonoriloj, la eŭropaj sonas per frapiĝo de ĝia lango. En la muzeo oni povas vidi ankaŭ tre delikatajn sonorilojn el Francio, Britio, Finnlando kaj Rusio. El ili la plej valora estas la franca sonorilo Josefo Maria. La bela sono de tiuj eŭropaj sonoriloj ŝajne estas rakonto pri la pasinta longa tempo...

Nokte de antaŭvespero de la nova jaro en la templo kolektiĝas miloj kaj miloj da ĉinoj kaj fremdlandaj turistoj por aŭskulti la belan sonon de la sonorilo-reĝo. ■




En la Muzeo de Antikvaj Sonoriloj

Draka sonorilo



Fajenca sonorilo








Sonorilo-rego

Gamo-sonorilaro





# Ĉu la ĉina lingvo malfacila? (I)

de ZHANG QICHENG\*

**A**L tiu ĉi demando, miaopinie, la respondo devas esti: kaj jes kaj ne. Por tion klarigi, mi skribos mian artikolon en du partoj. La unua parto temas pri la ĉinaj ideogramoj, kaj en la dua parto mi traktos la lingvon mem.

Parolante pri la ĉina lingvo, oni kutime havas la imagon pri la strangaformaj, bildsimilaj ideogramoj. Ellerni tiujn ideogramojn estas vere malfacile, precipe por la okcidentanoj.

Antaŭ ĉio, la ĉina lingvo ne estas alfabetaj, ĝi ne estas strukturita el literoj, sed formita el kvadratformaj ideogramoj kreitaj per diversformaj strekoj. Ekz., en la ĉina lingvo, la vorto Esperanto estas ĉinigita kiel 世界语\*\*, (*Shijieyu*), la tri ideogramoj estas kreitaj per strekoj —, |, L, 7, /, \, \, kaj 7. Tial, la ĉina lingvo tute diferencas de la alfabetaj lingvoj. Kiam oni lernas la alfabetajn lingvojn, nur se li konas la literojn kaj ankaŭ scias la regulojn de prononcado, ĝenerale li povas prononci la aperantan vorton. Kaj se li jam posedas tiun vorton en sia parola lingvo, li ankaŭ povas kompreni ĝian sencon. Sed oni ne kapablas fari tion en lernado de ĉinaj ideogramoj. Li ne povas prononci la ideogramon laŭ ĝia formo, kaj kompreneble, nek kompreni ĝian sencon.

La tuta nombro de la ĉinaj ideogramoj estas ĉ. 60 000, eĉ la alte klerigitaj ĉinoj ne povas koni ĉiujn, por ne paroli pri la ordinaraj homoj. Krome, troviĝas ideogramoj, kiuj kun tre komplikaj strukturoj, estas formitaj el multaj strekoj. Estas multaj ideogramoj, kies prononcado estas sama, ekz., la ideogramo “*Zhong*” el “*Zhong Guo*” (Ĉinio) havas la saman prononcon kun aliaj 30 ideogramoj, kaj tio ne estas malofta fenomeno. Antaŭe la ideogramoj kun similaj formoj ne estas malmultaj, ekz., la ideogramo 己 (*yi*, jam) kaj la alia 己 (*ji*, mem) nur iomete diferencas inter si, do ili estas ne facile distingeblaj.

Sekve, oni asertas, ke la ĉinaj ideogramoj prezentas kvar malfacilojn, nome, malfacilojn en konado, legado, skribado kaj memorado. Unuvorte, ili estas ege malfacilaj.

Tamen, kiam ni konfirmas la malfacilecon de ĉinaj ideogramoj, ni devas samtempe rimarkigi, ke ili ne estas tiel malfacilaj, kiel oni argumentas aŭ imagas.

Versence, ĉinaj ideogramoj estas simboloj de

ideoj. Multaj bazaj ideogramoj estas hieroglifoj, ekz., la ideogramoj 日 (*ri*, suno), 月 (*yue*, luno), 山 (*shan*, monto), 人 (*ren*, homo), 火 (*huo*, fajro), 木 (*mu*, arbo) devenas respektive de siaj originaj figuroj: ☉, ☾, 人, 火, 木. Kvankam tiuj ideogramoj ŝanĝiĝas en formoj pro la ŝanĝo de skribmanieroj dum sia kelkmiljara evoluo, tamen, ili ĝis nun ankoraŭ prezentas la spurojn de hieroglifo. Aldone estas la tiel nomataj “memklarigaj ideogramoj” kaj “kombinite klarigaj ideogramoj”. Lasu nin preni la ideogramojn 上 (*shang*, supre) kaj 下 (*xia*, sube) kiel ekzemplojn de la “memklarigaj ideogramoj”. Oni prenas la horizontalan strekon “—” kiel bazon, aldonante la signon 卜 sur ĝi, kaj kreis la ideogramon 上, aldonante la signon 卜 sub ĝi, kaj kreis la ideogramon 下. Alia ekzemplo estas la ideogramo 立 (*li*, stari). Ĝia origina figuro estas 立, kiu montras, ke iu homo staras sur la tero. La “kombinite klarigaj ideogramoj” estas kombinoj de du aŭ pli ol du ekzistantaj ideogramoj por krei novan ideogramon por esprimi ian sencon. Ekz., la ideogramo 日 (*ri*, suno), kunmetite kun alia ideogramo 月 (*yue*, luno), fariĝas nova ideogramo 明 (*ming*, lumo aŭ brilo), ĉar la antikvaj ĉinoj nur sciis, ke la suno donas lumon tage kaj la luno donas brilon nokte. Alia ekzemplo estas la ideogramo 炎 (*yan*, varmega), kiu estis farita el du ideogramoj 火 (*huo*, fajro) unu super la alia kaj ĝi signifas varmegon. La ideogramoj 笑 (*xiao*, ridi) kaj 哭 (*ku*, plori), kvankam ne estas hieroglifoj, tamen estas tre piktogramaj. La antaŭa spegulas la ridantan mienon kaj la lasta bildigas la mienon kun larmoj. Eĉ tiu, kiu ne scipovas la ĉinan lingvon, povas konjekti la sencojn de tiuj du ideogramoj je la unua rigardo.









La ideogramoj el la tri supre traktitaj kategorioj ja estas pli-malpli facile kompreneblaj per cerbumado aŭ rezonado.

Bedaŭrinde estas, ke tiaj relative facilaj ideogramoj konsistigas nur proksimume 10% de la tuta nombro de la ĉinaj ideogramoj. La restantaj 90% estas kombinoj de idea signo kaj sona signo. Tiaj ideogramoj konsistas el ĉ. 190 “*bushou*”-oj (speco aŭ parto). *Bushou*-o ludas gravan rolon en formado de plejparto de ideogramoj, tamen mi ne povas detale pritrakti ĝin en tiu ĉi artikolo, mi nur donos klarigon per diversaj ekzemploj. Estas *bushou*-o de t.n. “tri gutoj da akvo”, ĝia simbolo estas 彡. Sin trovas pli ol 500 ideogramoj kun tiu *bushou*-o, kiuj pli-malpli rekte aŭ

nerekte rilatas al akvo. Ekz., la tri ideogramoj 江 (*jiang*, rivero), 河 (*he*, rivero), 湖 (*hu*, lago), ĉiuj havas je la maldekstra flanko la simbolo 丿, tio signifas ke ili ĉiuj estas akvecaj, kaj je la dekstra flanko estas respektive la ideogramoj 工, 可 kaj 胡, kiuj montras la prononcon. El tiuspecaj ideogramoj ankaŭ troviĝas kelkaj kun simbolaj sencoj, ekz., la ideogramo 泪 (*lei*, larmo) estas farita el 丿 kaj 目 (*mu*, okulo), ĝi signifas, ke akvo fluas el la okuloj, nome, larmo. Krom akvo, al homoj ankaŭ ne mankeblas fajro, do, estas *bushou*-o de "fajro" 火 por fajro-sencaj ideogramoj. Ankaŭ estas *bushou*-o de metalo 钅 por formi la ideogramojn iel rilatantajn al metalo. Tiel, la fakaj sciencistoj povas facile krei novajn ideogramojn por la diversaj metalaj elementoj simple per kunmetado de la *bushou*-o 钅 kun simplaj ideogramoj montrantaj ilian prononcon, ekz., oni kreis la ideogramojn 轴 (*you*), 钋 (*po*) kaj 钷 (*gu*) por "uranio", "polonio", "kobalto" ktp. Estas rimarkinde, ke pro la ŝanĝigo de prononcado de la ideogramoj dum ilia longtempa ekzistado, la prononca parto de iuj ideogramoj nun ne precize reprezentas ilian sonon, ekz., la prononca parto 工 (*gong*) de la supre menciita ideogramo 江 (*jiang*) nun ne similas al la sono de tiu ideogramo.

Mi skribis iom longe pri *bushou*-o, por ke vi sciu, kiel estas konstruita la plejparto de ideogramoj. Tio eble iagrade helpus vin en lernado de la ĉina lingvo.

La fakto, ke la tuta nombro de la ĉinaj ideogramoj eĉ atingas 60 milojn, verŝajne malkuraĝigas vin. Tamen, malkuraĝigo estas apenaŭ necesa, ĉar, laŭ la kalkulo de fakuloj, el tiuj 60 mil ideogramoj, nur 3 650 estas ofte uzataj. Nur se oni posedus tiujn ofte uzatajn ideogramojn, li jam povas kompreni 99% de la enhavo de la ĵurnaloj aŭ revuoj ĉinlingvaj. La ofte uzataj ideogramoj nur konsistigas 6.1% de la tuta nombro, tio ja estas tre malgranda procento. El la

			
<b>suno</b>	<b>luno</b>	<b>arbo</b>	<b>fajro</b>
			
<b>homo</b>	<b>staro</b>	<b>okulo</b>	<b>monto</b>

restantaj pli ol 50 000 ideogramoj, iuj estas malofte uzataj, iuj estas uzataj nur por personaj aŭ geografiaj nomoj, kaj plej multaj estas simple troveblaj en antikvaj klasikaj verkoj. Se vi ne bezonus tuŝi la malfacile koneblajn nomojn, nek dezirus legi la antikvajn klasikaĵojn, la 50 mil ideogramoj ja estus por vi kvazaŭ neekzistantaj.



Kaj plie, la nombro de multstrekaj ideogramoj multe malpliigis post la reformado de la ĉina skriba lingvo. Entute pli ol 2 000 ideogramoj estas skribe simpligitaj. Tio multe faciligas la lernadon de ĉinaj ideogramoj.

Ĉiu ideogramo nur havas unu silabon. En antikva tempo, ĉiu unusilaba ideogramo estis unu vorto esprimanta ian sencan. Sed en nuntempa ĉina lingvo, malgraŭ tio ke ankoraŭ estas unu vorto formita el unu ideogramo (ekz., la vorto *shu* — libro), la diversaj ideogramoj fakte fariĝas nur morfemoj de vortoj. Unu ideogramo estas ofte kunmetita kun alia aŭ aliaj du aŭ pli ol du ideogramoj por formi unu vorton, la supre menciita vorto 世界语 (*Shi-jie-yu*, Esperanto) estas ĝuste formita el tri ideogramoj. Konsekvence, se vi posedus la ofte uzatajn 3 650 ideogramojn, vi samtempe scipovus dekmilojn da vortoj formitaj el tiuj ideogramoj. Lasu min preni la ideogramon *che* (ĉaro) kiel ekzemplon. Ni povas aldoni la ideogramojn *huo* (fajro), *ma* (ĉevalo), *qi* (gaso), *ren-li* (homa forto), *san-lun*, (tri radoj) antaŭ ĝi kaj formas la vortojn *huo-che* (trajno), *ma-che* (ĉevalĉaro), *qi-che* (aŭtomobilo), *ren-li-che* (rikiŝo), *san-lun-che* (trirada ĉaro) ktp. Ni ankaŭ povas aldoni la ideogramojn *xiang* (ĉambro), *piao* (bileto), *zhan* (stacio) post ĝi por formi la vortojn *che-xiang* (kupeo), *che-piao* (trajna aŭ aŭtobusa bileto), *che-zhan* (fervoja stacio aŭ aŭtobusa haltejo) ktp. Tiurilate, la ĉina lingvo multe similas al Esperanto, kaj eĉ pli fleksebla kaj pli varia ol Esperanto.

La renoma lingvisto s-ro Claude Piron, en unu el siaj verkoj, skribis, ke en la ĉina lingvo, same prononcataj ideogramoj ankoraŭ havas kvar malsamajn tonojn. Li donis ekzemplojn per la ideogramoj 妈 (*panjo*), 吗 (iom simile al ĉu), 马 (ĉevalo) kaj 骂 (*insulti*). Tiuj kvar ideogramoj estas same prononcataj kiel "ma", sed havas malsamajn tonojn. Tio verŝajne pliigas la malfacilecon de la ĉina lingvo. Tamen, en reala vivo, tono tute ne gravas, eĉ multaj ĉinoj ne povas tre perfekte elparoli la ĝustan tonon. Kantonanoj havas kantonan tonon, dum pekinanoj havas sian propran tonon, sed tio ne malhelpas ilian interkomunikadon. Ĝuste kiel la angla lingvo parolata de usonanoj estas iom diferenca de tiu de la angloj, kaj tiu diferenco ne malhelpas ilian interkomprenon. Do, la malsamaj tonoj de ĉinaj ideogramoj ne kaŭzas embarason. ■

\*La aŭtoro estas vicprezidanto de ĈEL kaj honora membro de UEA.


\*\*Krom kelkaj ideogramoj, la ekzemploj en la ĉina lingvo estas skribitaj en la latinigitaj formoj per kursivaj literoj kaj post ili la Esperantaj ekvivalentoj.





# NODO-FARADO

Fotoj de LI LING




Ŝnuro havis mirindan uzeblecon. En la antikveco, kiam ĉinoj ne havis skriban lingvon, ili notis per nodoj: granda nodo por grava afero kaj malgranda por malgrava.

En la 2-a jc a.K. ĉinoj faris metiartaĵon per nodo-farado. Ili plektis vestornamojn el silkaj fadenoj, i.a. zonon de virino. Poste la arto de nodo-farado senĉese disvolviĝis kaj en la 17-a jc furoris nodo-faraĵoj, kiaj ornamoj por muro, virina vesto, tabakujo, okulvitrujo, incensa saketo, kapharoj, ventumila kaj kolĉena pendaĵoj.

Bedaŭrinde, en la nuntempo, pro terura manko de tiuflankaj metiistoj la arto preskaŭ perdiĝis. Malgraŭ tio, ĝi ankoraŭ povas trovi siajn ŝatantojn. Unu el ili estas s-ro Shao Jin, kiu diplomiĝis el Zhejiang-universitato.

Li tre interesiĝas pri tiu arto kaj laboris super ĝi ses jarojn. Dank' al tio, reviviĝis la tradicia arto.

Aparte admirinda estas grandioza mur-ornamo plektita de li el 30 m longa dika ŝnuro pezanta 5 kg. Nun ĝi estas konservata en la Ĉina Internacia Centro de Kulturo kaj Arto. Li lertas plekti el dikaj kaj maldikaj silkaj fadenoj vest- kaj mur-ornamojn de diversaj specoj kaj formoj.



# Virinoj, konsilistinoj pri ŝtataj aferoj

**S**E mi vidus ilin en iu alia loko, eble mi ne povus distingi ilin disde la ofte vidataj virinoj trabutikantaj aŭ vizitantaj legombazon. Sed ĉi-foje mi vidis ilin en la halo de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, tial mi nature turnis apartan atenton al ili, ĉar tiam, reprezentante la virinaron, 48% de la totala loĝantaro de Ĉinio, ili donis siajn opiniojn kaj konsilojn pri gravaj politikoj de la ŝtato. Ili estas membroj de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

## FILINO DE LA FLAVA RIVERO

Ŝi nomiĝas Niu Xiaoping, venis al Pekino el la urbo Lanzhou, nordokcidenta Ĉinio, ĉe la Flava Rivero. Evidente, nia patrino rivero dotis tiun ĉi modestan virinon per rozetaj vangoj. Antaŭ dek jaroj, kiam tiu gracila knabino sur neniom rimarkinda pordo alpendigis la ŝildon de "Huanghe-a Kopipresejo de Lanzhou", ŝi eĉ ne imagis al si, ke ŝi fariĝos renoma entreprenisto post

kelkaj jaroj, kaj plie membro de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

Tute kontraŭvole devigate Niu Xiaoping rezignis sian oficon en ŝtata institucio, kaŭze de tio, ke en la oficejo okazis ŝtelo, kaj iuj suspektis ŝin nur pro malriĉeco de ŝia familio. Por sia senkulpeco ŝi komencis novan entreprenon, uzante kelkajn simplajn tajpilojn.

Ŝi sukcesis. Nun ŝia kopipresejo fariĝis komputile presa kompanio kun kapitalo de pli ol 8 milionoj da juanoj. Ŝi diris, ke mono ne povas anstataŭi sukceson, plej grave estas strebi por la idealo kaj gajni la socian agnoskon. Kvankam iuj homoj ŝin traktis nejuste, tamen la socio donis al ŝi ŝancon de sukceso. Ŝi deziras rekompenci la socion pro ĝia granda favoro.

Ŝi diris al mi, ke en la ĉi-foja sesio de la konferenco, ŝi prezentis du proponojn, unu el kiuj temas pri industrio. Ŝi diris: "En la 6-a kaj la 7-a jardekoj, la industrio de la provinco Gansu ludis grandan rolon en Ĉinio, sed nun

ĝi dronis en dilemo — duono de entreprenoj de la tuta provinco ne povas produkti normale. En iuj relative evoluintaj lokoj, ne-registara entreprenoj povas unufoje kreditiĝi je 5 milionoj da juanoj, sed en Gansu nur je miliono. La malvigla situacio de ŝtataj entreprenoj malhelpas la evoluadon de komunaj kaj privataj entreprenoj. Tial mi apelaciis al la centra registaro doni favorojn al Gansu, ekzemple kapitalon, por ke la tieaj entreprenoj havu monon por la transformado de teknikoj kaj instalaĵoj..."

Niu Xiaoping havas bonan edzon kaj tri-jaran filinon. Ŝi ĉiam mem prizorgas la infanon, por ke la lasta plene ĝuu la patrinan amon. Tamen, en ŝia koro, krom ŝia propra familio kaj ŝia kompanio, estas ankaŭ la urbo Lanzhou, la provinco Gansu kaj la tuta Ĉinio.

## POR EDUKADO

La Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco estas unuefronta organizo, kaj unu el ĝiaj devoj estas plene disvolvi demokration kaj ludi la rolon kon-



S-ino Kang Ling (dekstre) intervjuata dum la konferenco

trolan kaj helpan rilate al la registaro. Pro tio, en la tutlanda komitato de la konferenco kolektiĝas personuloj el diversaj flankoj de Ĉinio. En la sesioj de la konferenco ili montriĝas plej senĝenaj en esprimado de siaj opinioj, kelkfoje eĉ kun akraj vortoj.

Intertempe mian atenton altiris diketa virino kun ordinara vizaĝo. Ŝi lertis trovi problemojn en alies parolado. Ankaŭ ŝi estas membro de la tutlanda komitato de la konferenco. Ŝi nomiĝas Pan Lizhen, citologia profesoro el mulaŭ-naciminoritato de Ĉinio. Ŝi kun fiero diris al mi, ke laŭ la mulaŭ-a tradicio la virinoj mas-tras en la hejmo, kaj la knabinoj ne suferas de diskriminacio. Pro tio ŝi ne havas apartan impreson rilate aliĝon de la virinoj al la ŝtataj aferoj. Ŝi diris: "Mi volonte partoprenas en la ŝtataj aferoj. Mi estas reprezentanto de 150 mil mulaŭoj, kaj mi devas propa-rola por ili."

S-ino Pan Lizhen diris, ke la mulaŭoj alte taksas la edukadon. Ŝiaj gepatroj havas 9 gefilojn, el kiuj 7 vizitis universitaton, kaj 5 el ili kvalifikiĝis kiel altrangaj

intelektuloj. De la infanaĝo ŝi inkliniĝas al biologio, kaj atingis gravajn sukcesojn en la citologia kampo. Ŝi diris, ke en la pasinteco ŝia familio tre malriĉis, tiel ke ŝi portis pajlosandalojn tutjare. Sen helpado fare de la popola registaro, ŝi ne povus viziti lernejon. Tial ŝi fiksas sian atenton sur la edukado. Post multaj kontaktoj kun diversaj flankoj, ŝi prezentis proponojn al koncernaj departementoj, kaj antaŭ nelonge ŝia propono estis akceptita kaj efektivigata — al ŝia hejmloko en Guangxi kaj la Medicina Instituto, kie ŝi laboras, oni asignis monon por konstruado de la teknika kolegio kaj la instituta domo.

Same kiel Pan Lizhen, ankaŭ alia virina membro de la tutlanda komitato de la konferenco prezentis la proponon pri progresigo de la edukado en sia hejmloko. Ŝi nomiĝas Lu Shixian, devenis de bulang-naciminoritato en la montaro de la provinco Yunnan, sudo-orienta Ĉinio. Ŝi estas instruistino, ne-altastatura sed fortika. Ŝi diris al mi, ke ŝi loĝas en aŭtonoma gubernio el kvar naciminoritatoj. En la gubernio estas 310

elementaj lernejoj, kaj 159 el ili ĉiu havas nur unu instruiston. Lu Shixian laboras kiel instruistino jam 27 jarojn, sinsekve en 6 lernejoj, neniam forlasante la montaron. Ŝi diris, ke kvankam la laboro estas peniga kaj laciga, tamen ne mankas al ŝi ĝojo kaj feliĉo. Ŝin maltrankviligas tio, ke la lerneja domo kadukiĝis. Ekzemple, la elementa lernejo estrata de ŝi havas nur kelkajn ĉaletojn, ĉirkaŭ tiuj vagadas kokoj kaj porkoj, ĝenante la instruadon de la lernejo. Pro tio, en la ĉeesto de la nuna sesio de la konferenco ŝia plej forta deziro estas havigi al ŝia gubernio monrimedojn por konstrui naciminoritan elementan lernejon.

## "KARULINOJ EL LA GEPATRA DOMO"

En Ĉinio la virinoj rigardas kiel sian "Gepatran Domon" la Tutlandan Virinan Federacion, kiu povas solvi diversajn malfacilojn por ili kaj defendas ilin kontraŭ maljusteco. S-inoj Guan Tao kaj Kang Ling ja estas du el la domo.

Guan Tao estis veterana ĵurnalistino, kaj Kang Ling — universitata profesoro. Poste ili forlasis sian profesion kaj ekokupis sin pri la virina laboro. Kial? Al mia demando, s-ino Kang Ling respondis, ke komence, ŝiaj konatoj inkl. ŝian edzon, ne komprenis. Malgraŭ tio ŝi insistis pri sia decido. La ĉefa motivo estas, ke antaŭ kelkaj jaroj denove aperis en Ĉinio maltrankviligaj fenomenoj, elmergiĝis iuj sociaj sedimentoj eliminitaj jam en la 50-aj jaroj, kiaj prostituado, trompa vendado de virinoj. Pro tio nepre necesas helpi tiujn difektitajn kaj vojdeviajn virinojn, por ke ili havigu al si memestiman kaj memrespektan konscion kaj gajnu la socian pozicion memstaran.

Kiel fakuloj pri virinaj problemoj ili parolis al mi pri enoficigo de virinoj, ilia partoprenado en la





Qiu Yun en telefonado

VIRINOJ KAJ INFANOJ

# Mi kaj mia termolinio

de QIU YUN

**M**I nomiĝas Qiu Yun. 25 jarojn antaŭe mi naskiĝis en Wuhan, en la meza parto de Ĉinio.

Post mia naskiĝo, kiam mi eĉ ne malfermis la okulojn por rigardi tiun mondon, la neatentema flegistino, kiu zorgis min pri sterilizado, enlasis antisepsan likvaĵon en miajn okulojn. Tiu nepardonebla eraro preskaŭ pereigis min.

De la unua paŝo mi devis palpi en mallumo. Falinte, mi denove stariĝis kaj refalis kaj restariĝis. Petolemaj knaboj ĵetis al mi terbulon kaj mokis min per "blindulo". Neniu volis ludi kun mi. Mi pasigis mian infanecon en soleco kaj izoleco.

Ekzameno atestis, ke mi estas tute blinda je la

dekstra okulo kaj la vidkapablo de la maldekstra estas nur 0.01 grado. En la lernoago, mi ne volis viziti lernejon por blinduloj, dum ordinaraj lernejoj min ne akceptis. Kun malnovaj lernolibroj de miaj pliaĝaj gefratoj, mi eklernis helpe de mia apenaŭa vidkapablo. En la aĝo de 9 jaroj, mi finfine eniris en elementan lernejon. Avide pri la bona ŝanco, mi energie lernis. Sed poste, kiam mi ĵus finis la lernadon de la unua klaso en mezlernejo en la aĝo de 16 jaroj, mi devigite ĉesis lerni pro divorco de miaj gepatroj.

Mi devis vivteni min per mi mem. Kie troviĝas laboro konvena al mi? Mi aŭdis, ke estas fabrikoj por kripluloj, sed tro multas laborpetantoj. Iutage mi vizitis manĝaĵfabrikon, kiu estas varbanta provizoran laboranton. Je mia foja-refoja petado, oni finfine

ŝtataj aferoj kaj la nasko. Ĉio estis klare kaj konvinke eksplikita de ili. Altstatura s-ino Guan Tao diris: "Ĉiujare, mi faras enketaĵon en diversaj lokoj 3-4 monatojn, poste skribas raportojn, kaj prezentas ilin al koncernaj departementoj de la registaro. Se iuj problemoj ne solveblas portempe, mi min turnas al propagandado tra diversaj kanaloj. Ekzemple, informiĝinte, ke en iuj lokoj oni tentas knabinojn al seks-servado, ŝi forte indigniĝis kaj verkis 6 kritikajn komentojn.

Ĉe nia disiĝo, Guan Tao kaj Kang Ling sciigis min, ke ĉiujare la Tutlanda Virina Federacio havas unu aŭ du ĉefajn esplorajn temojn, kaj la ĉi-jara temo estas laborigo de virinoj. Kompreneble estas alia ankoraŭ pli grava afero, t.e. la Kvara Monda Virina Konferenco.

## ALIA GRANDIOZA INĜENIERIAĴO

En la 5-a jardeko, debutis en Ĉinio juna kaj kapabla ministri-

no de la Akvoutiliga Ministerio. Ŝi nomiĝas Qian Zhengying kaj nun laboras kiel vicprezidanto de la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco. Kiel akvoutiliga specialisto ŝi gvidis la konstruadon de la fama Gezhouba-a akvoutiliga projekto sur Yangzrivero. Antaŭ nelonge ŝi prezentis projekton pri konstruado de "Yanghuang-a nova irigacia kanalo", kaj tion oni varme aprobis en la ĉi-foja sesio de la konferenco.

akceptis min por prova servo. Stumblante, mi trovis iom post iom la senton kaj povis transporti varojn pezajn je kelkdekoj da kg. Por tiu laboro oni pagis al mi 100 juanojn monate.

Sed pli ofte mi restis senlabora. "Ĉu vere, ke mi estas sentaŭgulo?" mi foje-foje demandis min. Eble la morto povus liberigi min el la vivo tiel malfacila, mi plurfoje pensis en mi. Finfine mi forlasis tiun intencon, ĉar mi ne perdis la lastan esperon.

Miaj gefratoj aĉetis triciklon por mi. Mi veturis al la vivoplena strato — foiro de podetalaj komercaĵoj. Tie komercistoj aĉetis komercaĵojn kaj portis ilin al doko aŭ stacidomo.

Komence neniu kuraĝis lui mian triciklon, timante, ke mi kolizios kontraŭ aŭtoj. Nur kiam mi postulis duonan pagon postulatan de aliaj triciklistoj, iuj volis dungi min. Komence mi ne kuraĝis rapide tricikli al la stacidomo je kelkaj km for de la foiro. Por laŭeble pli rapide koni la vojon, ofte mi triciklis inter la foiro kaj stacidomo, eĉ kiam mi ne estis dungita. Tiele, mi triciklis dum 3 jaroj sur tiu vojo.

Poste, mi vendis fruktojn, sodakvon kaj lernoservis ĉe panisto. Fine mi havis ŝparmonon, kaj per tiu mi realigis mian deziron legi. Kiel ajn malluksege mi vivis, mi aĉetadis librojn. En mia malgranda ĉambro ĉie estas libroj, krom sur mia lito kaj tablo. Vespere mi legadis en mia nesto. Mi avida ensorbis sciojn de diversaj kampoj. Legado fariĝis parto de mia vivo.

Por legi mi devis teni libron tuj antaŭ mia maldekstra okulo je duoncolo. Krome mi devis havi ĉe mi bovlon da akvo por refreŝigi la okulon, kiam ĝi laciĝis pro longa legado.

Ĉe la fino de 1992, mi sola venis al Hainan, malfermita ĉemara regiono en suda Ĉinio. Unue mi laboris kiel vartistino por iu familio, mi gardis infanon, faris mastrumadon kaj legis en libera tempo. En hazarda okazo mi konatiĝis kun kripla junulo kaj eklaboris kiel telefonistino en lia kompanio.

Optimisma kaj entuziasma, tiu kripla junulo ener-

gie laboris, pli multe zorgis pri aliaj ol pri si mem. De li mi iluminigis, ke homo vivas ne nur por si mem.

Laborante kiel portempulo kaj administrante mangajan butikon, mi havis pli da enspezo, kaj mi intencis funkciigi termolinian telefonon per tiu sumo da mono, por ke diversrondaj gejunuloj konatiĝu kaj trovu intimajn amikojn pere de tiu termolinio.

Mi bone komprenis, ke solecaj homoj bezonas pli da amo, prizorgo kaj helpo. Kaj dank' al sinceraĵo helpoj de miaj multaj amikoj, mi ĉiam tenis la esperon por la vivo kaj venkis malfacilojn unu post alia.

Komence de aŭgusto 1994, ekfunkciis la termolinia telefono. Kaj en tiu tago mi estis telefonvokita pli ol 100 fojojn. La linio ĉiam estis okupata. Multaj elverŝis sian koron kaj ĉagrenon en telefono, dum mi sincere interparolis kun ili komunikante miajn senton, komprenon kaj entuziasmon pri la vivo.

Iu junulo implikita en amafero telefonis al mi, ke li enamiĝis al sia instruistino, sed estas amata de ŝia filino, kiun li ŝatas. Post dufoja konversacio kun mi, li ankoraŭ ne povis liberiĝi el la aflikto. Mi do konsultis psikologon. Poste mi telefonis al la junulo kaj donis al li konsilojn. Post kelke da tempo, li telefonis al mi, ke li jam bone solvis tiun problemon kaj kore dankis la termolinion.

Iu knabino telefone petis min interparoli kun ŝia plijuna frato, deprimita kaj malserena de grava trofunkciado de tiroido. Mi faris kun tiu malgaja knabo trifoje longajn konversaciojn en telefono. Finfine li liberigis sin el aflikto kaj ekhavis fidon venki la malsanon.

Ĉiutage mi havas telefonvokojn de diversaj lokoj de la lando. Pro troa parolado kongestis kaj doloris mia faringo. Sed mi amas tiun laboron. Donante ĝojon al aliaj, mi tion ĝuas en ĝojo. La termolinio allogis multajn gejunulojn. Ni organizis amikan rondon kaj literaturan societon por konsoli pli multajn vunditajn korojn per nia sincera amikeco. ■

En la suda parto de la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono, situanta sur la Leŭsa Altebenaĵo de nordokcidenta Ĉinio, aride sterilas la grundo kaj terure mankas akvo. Tio faris la nomitan montregionon fama pro malriĉeco. Koncernaj fakuloj iam proponis konstrui hidroelektran konstruaĵon en Daliushu sur la Flava Rivero, tamen tio bezonos 15 jarojn.

En la lasta septembro, Qian Zhengying kaj ŝiaj sekvantoj ve-

turis al Ningxia, kaj post esplorado ĉe la Flava Rivero, ŝi elmetis la projekton pri anticipa konstruado de la Yanghuang-a nova irigacia kanalo. Laŭplane oni devas investi 3 miliardojn da juanoj kaj uzi 6 jarojn por la kanalo, kiu ebligos ekspluatadon de 130 000 hektaroj da kampoj kaj solvon de problemo de mangaĵoj de miliono da loĝantoj.

Malgraŭ sia maljuna aĝo Qian Zhengying ankoraŭ naĝis en Yangzi-rivero antaŭ nelonge. Kvankam ŝi aspektas kiel tenera kajtingiĝa parto de la ĉina virinaro. ■

ordinara maljunulino, tamen ŝia projekto restas grandioza majstraĵo. Nun ŝia projekto, aprobita de la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio, estos metita en la "Naŭa Kvinjara Plano" de la ĉina registaro.

En la Tutlanda Komitato de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, la virinaj membroj konsistigas 14% de la tuta membraro. La nombro ja estas malgranda, tamen same kiel hejme ili estas nemankigeblaj, ankaŭ ĉi tie ili estas neanstataŭigeblaj, ĉar ili estas la dis-

BING CHUAN:

# La Pekina Urĝa Medicina Centro

**E**N Pekino, se iu subite suferas de akuta malsano, aŭ ie okazas grava akcidento, oni povas telefoni je la numero 120 por peti helpon de la Pekina Urĝa Medicina Centro (PUMC).

PUMC fondiĝis antaŭ 7 jaroj. Iun tagon mi vizitis ĝin en pinthoroj de trafiko, sed la ambulancoj de PUMC havas prioritaton de paso. Antaŭ la domo de PUMC estas du ambulancoj je dispono. Ambaŭflanke de la vestiblo estas ĉambroj por diagnozo kaj urĝa savo. Bona ordo regas en la ĉambroj.

Mi venis al la oficejo de PUMC en la sepa etaĝo, kaj s-ino Han Lu, kiu akceptis min, diris al mi kun bedaŭro, ke la du kuracistoj, konsentintaj mian intervjuon, ankoraŭ estis farantaj operacion. Ŝi diris al mi, ke la kuracistoj de PUMC ofte ne povas iri hejmen en regula horo.

PUMC originis de la Pekina Urĝasava Stacio fondita antaŭ 40 jaroj. En 1983 la itala registaro donacis 8 milionojn da usonaj dolaroj, kaj la stacio aĉetis nombron da ekipaĵoj kaj ambulancoj kaj trejnigis medicinistojn. La ĉina registaro elspezis 40 milionojn da juanoj por konstrui domon de PUMC. En la 31-a de marto, 1987, la centro komencis sian servon kaj la tuta lando ekuzis la telefonnumeron 120 por urĝa medicina helpo. Ĝi estas la unua moderna medicina centro, kiu kun prehospitala savo kiel la gravita punkto faras ankaŭ urĝa-medicinan esploradon kaj instruadon.

S-ino Han diris al mi, ke PUMC situas en la urbocentro kun tre facila trafiko. La domo okupas 3 250 kvadratajn metrojn kaj havas centralan klimatizadon. Sur la supro de la domo estas observa turo kaj helikoptera haltejo.

Sub la domo estas garaĝo por 40 ambulancoj. La centro estas ekipita per prizorgejo de gravaj malsanoj, hipertensia ĉambro, hemodializa ĉambro, CT-esploro, angiokardiograma ĉambro, elektroencefalograma elektrokardiograma ĉambro, ultrasona kardiograma ĉambro, sanga banko, klinika laboratorio, operaciejo kaj ekspedejo kun moderna komunikilo. Krome, ĉiu ambulanco estas ekipita per komunika sistemo, per kiu ĝi povas komuniki kun la centro aŭ hospitaloj en la urbo.

La centro disponas 100 malsanulajn litojn. 560 laborantoj prizorgas la prehospitalan urĝan savon, enhospitalan kuracadon kaj aliajn aferojn. La tuta personaro laboras en 4 skipoj por akcepti malsanulojn en ajna horo.

La centro prenas sur sin la taskon fari komandon, manovradon, statistikon, analizon kaj urĝan sa-

La Pekina Urĝa Medicina Centro



Savo de vundito





von por grava akcidento kaj transportadon kaj dumvojan flegadon al suferantoj de gravaj malsanoj en Pekino. Krome ĝi faras instruadon pri urĝa savo, ĝeneralligas sciojn pri urĝa savo, starigas modernan administran sistemon de urĝasava reto kaj faras fundamentan esplorado pri la urĝasava medicino.

La rolo de PUMC estas fari ĝustan kaj kategorian komandon por ĝustatempe organizi urĝan savon kaj servi al suferantoj de gravaj akutaj malsanoj, pere de la modernaj ekipaĵoj kaj medicina tekniko de urĝa savo.

En oktobro en la pasinta jaro, PUMC eniris en periodon de kulmino. En nokto de la 20-a de la monato, la centro elsendis 60 fojojn ambulancojn kaj medicinistojn en 8 horoj por doni urĝan helpon al malsanuloj. Kaj la CT-esploro akceptis tiunokte pli ol 30 pacientojn.

S-ino Han diris al mi tagordon de iu tago kiel ekzemplon:

35 minutojn post la 7-a de la

20-a de oktobro, kiam estis interŝanĝo de la skipoj kaj la deĵorantoj post maldorma nokto estis pretaj iri hejmen, subite sonoris telefono kaj aŭdiĝis voĉo de maltrankvila viro en la aŭdilo, ke okazis kolizio de vagonaro kun aŭtobuso. Direktoro de la ekspedejo tuj faris ordonon per telefono:

Tuj elsendu 6 ambulancojn;

Telefone raportu al la koncernaj personoj de la pekina registaro kaj sanprotekta departemento;

Ĉiuj sekcioj de PUMC faru preparadon por akcepti vunditojn...

Laŭ la bezono de la cirkonstancoj de la akcidento la ekspedejo mobilizis la urĝasavan reton de la urbo. Direktoro de PUMC iris kune kun grupo da ambulancoj al la akcidentejo, kaj post tio la tria grupo da ambulancoj eliris por disporti la vunditojn al aliaj hospitaloj.

Post unu horo la kadavroj de mortintoj estis bone traktitaj, 49 vunditoj estis portitaj en 7 hospi-

talojn kaj la 4 plej grave vunditaj homoj estis portitaj en la centron. En la 3-a posttagmeze ĉiuj vunditoj elliberiĝis el minaco de la morto.

Kiam la du kuracistoj, kiuj konsentis akcepti mian intervjuon, lace eliris el la operaciejo, mi rigardis la horloĝon kaj sciigis, ke ili maldormis pli ol 30 horojn. Kaj tiam ili ankoraŭ devis fari operacian noton.

La eksterordinaraj cirkonstancoj de la profesio hardis eksterordinaran personaron. Pli ol 200 homoj de PUMC longtempe okupiĝas pri prehospitala helpo. Ĉu en frosta vintro, ĉu en varmega somero, ĉu en pluvo kaj ventego, ili hastas al la pacientoj kunportante instrumentojn en la pezo de 18 kg. Ili preskaŭ ne havas feriojn, kaj en la festoj ilia laboro estas ofte pli intensa.

En la pasintaj 7 jaroj PUMC persiste prenis prehospitalan savon kiel la ĉefan punkton kaj akcentis ankaŭ la interligiĝon de pre- kaj enhospitala savo, kaj ekspedis ambulancojn por 250 mil hom/fojoj, kaj sukcesis savi pli ol 2 000 vunditojn de toksigo, trafika akcidento, terfalo kaj kraŝo. ■

## REAGO AL FONDAĴO EPC-ABONO

Ĉi-sube ni listigas la donacojn al Fondaĵo EPC-abono ricevatajn de oktobro 1994 ĝis aprilo 1995.

**Ĉinio:** Cai Shouzhi (20,00 juanoj); Yin Feiran (15,00 juanoj); Zhou Xiaoqing (15,80 juanoj). **Germanio:** Anonime (138,00 germanaj markoj, 4,00 germanaj markoj, 20,00 usonaj dolaroj); E. Andraschko (4,00 germanaj markoj); Alfred Court (10,00 usonaj dolaroj); Erich Gold (4,00 germanaj markoj); Elisabeth Kopietz (54,00 germanaj markoj); Otto Nitsche (100,00 germanaj markoj); Heinz Schindler (120,00 nederlandaj guldenoj); Bruno Vogelmann (312,00 nederlandaj guldenoj); Wilhelm Wieser (50,00 germanaj markoj). **Finnlando:** Tapio Sormunen (222,00 finnaj markoj). **Francio:** Schertzer Edouard (40,00 usonaj dolaroj); Pierre Orliang (150,00 francaj frankoj); Jacques kaj Medeleine Tourtois (100,00 francaj frankoj). **Italio:** Giorgio Bianchi (1000,00 italaj liroj); Gori Ginevra (2000,00 italaj liroj); Paola Gozii (2000,00 italaj liroj); E. Mello (50,00 usonaj dolaroj); Giuseppe Trambaiolo (64000,00 italaj liroj). **Japanio:** Nagaoka Ziro (30 internaciaj respondkuponoj). **Kolombio:** Lope Varela C. (5,00 usonaj dolaroj). **Norvegio:** Klubo Esperantista en Oslo (10,00 usonaj dolaroj). **Svedio:** Gunnar Nilsson (50,00 germanaj markoj).

Multajn korajn dankojn al ĉiuj donacintoj!

La Red.

XIAO NAN:

# INTIMA NAJBARECO

**S**ANHAJO estas la plej granda urbo en Ĉinio. En la lastaj jaroj en tiu ĉi urbo aperis multaj plansetlejoj el altaj domturoj. Oni do enloĝiĝis en apartamentojn. Rapide pliboniĝis la loĝado de ŝanhajanoj. Tamen la troloĝateco ankoraŭ ne malaperis. Enketo montris, ke nun en Ŝanhajo ankoraŭ estas 280 000 familioj, kies pokapa loĝ-areo estas malpli ol 4 kvadrataj metroj, kaj pli multaj familioj ne havas gasforon nek kompletigitan necesejon. Kiamaniere ili do tenas la najbarecon en la limigita spaco, kie oni loĝas tiel malvaste?

Mi vizitis iun brikan domon tegole tegmentitan. En ĝia komune uzata kuirejo 6 kvadratajn metrojn vasta staras 6 gasfornoj, kiuj apartenas al 6 familioj. Somere en la kuirejo estas sufoke varme kiel en alttemperatura laborejo.

Proverbo diras, ke dentoj foje mordas la langon, tamen ambaŭ pace kunestas. Kiel oni povus tute eviti malakordon en tiel malvasta spaco? Konfliktoj ofte okazas pro bagatelo, ekz. por okupi pli da spaco, pro ne egala divido de la pago por elektro kaj akvo, sed malakordo neniom helpas al solvo de la problemoj kaj male malutilas al akordigo, ĉar ĉiutage oni bezonas kuiri, tial la loĝantoj plejparte tenas sin cedeme en la rilatoj al siaj najbaroj. Faktoj pruvis, ke reciproka cedado kaj pacienca interkonsiliĝo kondukas al harmonia medio. Multaj konscie utiligas la horojn, t.e., tage, la emeritoj preparas tagmanĝon kaj vespermanĝon antaŭ la reveno de la junaj najbaroj, por ke ili povu pli facile prepari manĝaĵojn en la kuirejo ne tiom plena de homoj. Se iu bezonas ian spicaĵon kaj ne havas ĝin ĉemane, la narbaroj volonte donas al li la bezonaĵon.

Kiel statas la loĝantoj de apartamentoj en la



Helpo al maljunulino

pluretaĝaj domoj? Ĝenerale ili forestas de la loĝejoj por laboro aŭ lernado, kaj iliaj loĝejoj estas ŝlositaj. Kompreneble en iuj hejmoj estas emeritoj. Kion do oni devas fari, se tiuj maljunuloj subite malsaniĝas, kiam la publika servo ne estas kompletigita?

En iu domturo de Zhabei-distrikto estas interhelpa grupo por urĝa bezono. Ĝi solvas multajn malfacilojn por la tieaj loĝantoj. Ĝi estas iniciatita de emerita kuracisto s-ino Fei Jinglan. Foje ŝi savis maljunulon atakitan de akuta kormalsano kaj ekhavis la ideon starigi ian helpan organizon por la malsanaj maljunuloj, kiuj restas hejme tage sen prizorgo de siaj familianoj. Ŝi vizitis ĉiujn familiojn en la domo por informi pri la sanstato de la gemaljunuloj kaj petis iliajn opiniojn. Helpate de la kvartala loĝantara komitato ŝi fondis interhelpan grupon el 9 emeritaj virinoj. La grupo donis al ĉiu maljunulo karton, sur kiu legiĝas nomoj de la membroj de la grupo kaj numeroj de ties apartamentoj, iliaj telefon-numeroj kaj la telefonnumero de la Urĝa Medicina Centro. Membroj de la grupo regule vizitas la gemaljunulojn. Ĉiu el ili havas medikamentojn sub la mano. Printempe de la pasinta jaro iu maljunulo grave malsaniĝis kaj membroj de la grupo ĝustatempe portis lin en la hospitalon por urĝa savo.

La interhelpa grupo multe trankviligis la maljunulojn kaj iliajn familianojn. Iu hemiplezia maljunulo diris: "Mi loĝas en alta etaĝo kaj antaŭe multe maltrankvilis pro subita malsaniĝo, sed nun la membroj de la interhelpa grupo ofte vizitas min."

Mi vizitis alian domon. Tie la 24 familioj kune penas por krei bonan medion. Ilia reciproka helpemo estas multe laŭdata.

# NOVA DIMENSIO EN ESPERANTIO

de SONJA BRUN (Svislando)

**Dum la unua semajfino en 1995 dudeko da aktivuloj el ĉiuj anguloj de Svislando kunvenis en la hotelo Steghof, Lucerno kaj spertis la etoson de aldona dimensio en Esperantio: D-ro Marco Picasso, fakulo pri merkato kaj docento pri Esperanto-informado kaj publikaj rilatoj en *La Kvinpetalo*, gvidis seminarion pri la temo: Kiel “vendi” Esperanton al la svisa publiko?**

La nova prezidanto de Svisa Esperanto-Societo (SES), Perla Martinelli, ne estis bezoninta longan tempon por ekkonstati, kion la Esperanto-movado en Svislando kaj ties membroj plej bezonas, nome novan “sparkon por antaŭenpuŝi la motoron”, entuziasmigi la diversajn lokajn Esperanto-grupojn iri novajn vojojn en la provo dissemi Esperanton ne nur kiel lingvon sed ankaŭ kiel kulturon kaj senton de internacia hejmececo.

Rezulte la estraro de SES engaĝis la fakulon Marco Picasso por seminario pri merkato, kiu en malmulte da tempo disponebla mirinde transformis sian profesion sperton al Esperanto. Kvankam pro tempomanko li devis prezenti la ampleksan temon en skatoligita maniero, s-ro Picasso logis nin el inertececo al akra atento pri la nuntempaj formoj de merkato kaj informado kun la celo kapabligi nin pli efike vendi nian varon, la lingvon Esperanto. La leĝoj de bona merkato — koni la produkton, la klientaron, la distribuservojn, la konkurencon kaj la informad-taktikon — estas ĉiuj aplikeblaj por surmerkati la lingvon Esperanto kune kun ĝia kulturo, kiuj dum sia centjara ekzisto evoluis de tradicia helplingvo al novtipa helpsocio. En la hodiaŭa mikrosocio de Esperantio certaj kapabloj valoras pli ol en la makrosocio. Kontraŭe al ŝtato, kie la loĝantoj estas sociaj objektoj, en Esperantio regas libera socio, kie ni estas subjektoj, kie la en- kaj eliro estas libervolaj.

En la unua tago s-ro Picasso skize instruis pri la koncepto de firma kaj mola partoj en iu produkto kaj emfazis la neceson, dum varbado li informis pli pri la mola parto de Esperanto ol la firma (reguleco, simpla gramatiko, fonetiko, fleksebleco ktp.), kiu jam estas sufiĉe konata. Estas necese krei ĉe la klientoj la bezonon posedi la produkton pro la mola flanko de nia lingvo: propedeŭtika valoro, samnivela interpersona komunikado, internacia hejmececo, inter- kaj transnacia kulturo, literatura valoro. Por atingi tiun celon s-ro Picasso demonstris i.a. la aplikon de nuntempa merkato laŭ ekz. la kvin punktoj de informado: anteno-lupeo-fokuso-prismo-solvo.

Vespere ni ĝuis referaĵon de Giorgio Silfer pri la svisa lerneja sistemo, kiu estas efektive almenaŭ tiom da sistemoj kiom estas kantonoj. La konkludo de tiu detala, profunde ellaborita kaj fakte bazita informo estis la konstato, ke estus multe tro komplika kaj ŝtona vojo provi apliki merkatakajn konceptojn por la enkonduko de Esperanto de supre. En Svislando ni devas krei Esperantion de malsupre.

La proksima tago komenciĝis per ripeto de la lernito en formo de demandoj kaj respondoj, sekvita de praktika apliko de la teorio. Grupoj dividitaj laŭ la tri ĉefaj svisaj lingvoj ricevis la kontestan taskon paralele verki leterojn direktitajn al diversaj celgrupoj aŭ celtavoloj por atentigi ilin pri la avantaĝoj de Esperanto. Ni provis per cerboŝtormado, diskuto kaj pensado sekvi la ĵus ellernitajn gvidliniojn. Kiom variaj la seminarianoj, tiom variaj estis la rezultaj laboraĵoj, inter kiuj la slogano “l Esperanto, moyen de locomotion” estis unu el la favoritoj.

Post pristudado kaj valorigo de diversaj ekzemploj de leteroj al gazetoj, la fina leciono kulminis en la profundiĝo de la identiĝo kun Esperanto en la raŭma senco, kun la nova perspektivo de alternativa kulturo kaj komunikado. — Dankon, d-ro Picasso. ■

S-ro Ye estas emerita instruisto. Por helpi junajn geedzojn en varto kaj kulturo de la infanoj, li memvole konigas al ili, kiel nutri la bebojn. Li gvidas elementlerneĵojn en ilia postleciono legado. Ĉar proksime de lia plansetlejo mankas infangardeno, li do multe helpas junajn gepatrojn, kiuj havas malfacilon en prizorgo de la infanoj. Ĉio ĉi estas multe laŭdata de liaj najbaroj.

Estas knabineto, kiu suferis de genetika cerebela malsano kaj ne povis piediri kiel sana homo. Ŝi estas multe helpita de sia najbaro s-ro Fu, kiu

laboras en konvaleskejo. S-ro Fu faris regulan kuracon al la knabineto, kondukis ŝin el la domo kaj subtenis ŝin en ŝia piedirado. Dank’ al lia helpo la knabineto finfine povis mem piediri kaj nun povas fari sporton samkiel ŝiaj kunlernantoj.


Estas 9-jara knabo. Ĉiutage, reveninte de la lernejo, li atendas leteriston. Ricevinte ĵurnalojn, li disdonas ilin al ĉiuj abonantoj...

Jen miniaturo de Ŝanhajo. Estas ja vere, ke tie oni loĝas dense kaj urĝe bezonas plibonigon de la kondiĉoj de loĝado. Tamen la intima najbareco iagrade mildigas ilian malkontenton. ■



ZHANG QINGZHEN:

# PRI LA ĈINAJ GIMNASTIKAJ TEAMOJ



Gimnasto Li Xiaoshuang en konkurso

**L**A jaro 1994 estis glorinda por la ĉinaj gimnastikaj teamoj. Ili gajnis bonajn atingojn en la mondaj konkursoj, unuopaj kaj teamaj, kaj ankaŭ en la 12-a Azia Sportkunveno. Reveninte de la konkursoj, ili, mi pensis, devus bone ripozi.

Kun la penso mi telefonis al ilia loĝejo, sed oni respondis, ke neniuj gimnasto estas en ĝi. Mi do iris al iliaj gimnastejoj. Ekster mia atendo, la gimnastejoj plenis de vikleco. La de mi konata gimnasto Li Jing sin ekzercis per duringo, dum la aliaj transkapiĝis aŭ sin ekzercis per helpaj movoj sur gimnastiloj. Ĉe la gimnastika matraco ĉeftrejnisto Gao Jian pacience direktis kelkajn novulojn en ekzercado, dirante, ke ili rektigu siajn brakojn kaj ne deviu de sia pezo-centro. Li foje kaj refoje demetis siajn ŝuojn kaj demonstris movojn al la ekzercatoj.

Ĉiusemajne Gao Jian donas tri lecionojn al la junaj trejnistoj kaj ofte iras al la gimnastejo por reĝustigi movojn ne bone faritajn de gimnastoj. Fininte trejnadon, la ĉeftrejnisto venis al mi. Informiginte pri la celo de mia alveno, li tuj komencis paroli kun mi.

Montrante la sloganon sur la muro "Plenforte kaj unuanime strebu por la teama ĉampioneco de la Monda Gimnastika Konkurso", li diris, ke tio estis la celo difinita de la teamo en la komenco de 1994.


La ĉinaj gimnastikaj teamoj generacio post generacio strebis al la teama ĉampioneco de mondaj konkursoj. La vira teamo sukcesis unuafoje en la 22-a Monda Gimnastika Ĉampioneca Konkurso, okazinta en 1983 en Budapeŝto de Hungario, kaj duafoje en la Monda Gimnastika Teama Ĉampioneca Konkurso, okazinta la 19-an de novembro 1994, en la germana urbo Dortmund. Antaŭ 11 jaroj la ĉina vira teamo per 0.1 poento venkis la sovetunian teamon kaj gajnis la ĉampionecon kaj ĉi-foje ĝi per 1.175 poentoj venkis la rusan teamon.

La Monda Ĉampioneca Teama Konkurso estas la plej altnivela gimnastika konkurso de la mondo kaj spegulas la ĝeneralan nivelon de la teamo. Pasintece, la ĉampioneco apartenis nur al la teamoj sovetunia, japana kaj ĉina, kaj plejofte al la potencaj teamoj sovetunia kaj japana. Por la ĉi-foja monda konkurso ĉiuj teamoj


faris diversajn penadojn: La teamo de Germanio engaĝis eks-sovetunian ĉampionon kiel trejniston; la japana teamo anstataŭigis du fortajn gimnastojn, kiuj ne sufiĉe bone lertis je la difinitaj movoj; kaj diversaj teamoj de la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj havis grandan ambicion ĉampioniĝi. Sub tiu cirkonstancaro, la ĉina teamo prezentis la sloganon: "Ĉiu faru sian eblon por la venko de la teamo!"

La ĉina teamo gajnis la trian lokon en la konkurso de la difinitaj movoj kaj per tio eniris en la finalon. En la konkurso kun la forta rivalo, rusa teamo, ĉiuj ses ĉinaj gimnastoj bone faris siajn movojn kaj finfine refoje gajnis la mondan teaman ĉampionecon. Tenante en la manoj la ĉampionecan pokalon, ĉeftrejnisto Gao Jian diris emocie: "Mi fieras ne nur pro la monda ĉampioneco, sed ankaŭ pro nia unuanima kaj luktema teamo."

"La grandaj konkursoj en la pasinta jaro hardis nian teamon, sed tio estas nur la unua etapo. Nia vera celo estas gajni la ĉampionecon en la 26-aj Olimpikoj de 1996." Gao Jian opinias, ke tio estas afero ege malfacila. Ĉar la



Gimnastino Qiao Ya en konkurso



Ĉeftrejnisto Gao Jian (maldekstre) kaj s-ro Huang Yubin, trejnisto de la Ĉina Vira Gimnastika Teamo

aĝo de la ĉinaj fortaj gimnastoj estas kompare granda kaj la kandidatoj-gimnastoj de la teamo estas relative malfortaj. Iuj landoj longtempe restas fortaj gimnastike ĝuste pro tio, ke la malnovaj gimnastoj apenaŭ atingas sian kulminon, kiam la novaj jam povas rivali kun ili. Jen kuŝas en tio la manko de la ĉina teamo. Krome, la ĉinaj gimnastoj ne estas samfortaj en la ses branĉoj de gimnastiko kaj tio pli-malpli influas la ĝeneralan nivelon de la ĉina teamo.

Enirinte en la gimnastejon de la virina teamo, ĉiuj vizitantoj senescepte malpezigis siajn paŝojn pro la tiea atmosfero. Trejnistino Lu diris ridetante: "Post certatempa trejnadon la trejnistinoj kaj gimnastinoj bone komprenas unu alian.

La virina teamo de Ĉinio vere estas kolektivo harmonia kaj diligenta. En la pasinta jaro ili gajnis unu mondan ĉampionecon kaj la kvaran lokon de la monda teama konkurso. En la 12-a Azia Sportkunveno, okazinta en Miroŝima de Japanio, ili gajnis la orajn kaj arĝentajn medalojn de ĉiuj branĉoj de gimnastiko kaj per tio vekis la atenton de la internaciaj gim-

nastikaj rondoj.

Nun en la virina teamo nombro da junaj gimnastinoj rapide progresas. Tie mi vidis, ke iu knabineto faris sur ŝtupa paralelo ege malfacilan movon kun korpotur-niĝado en aero kaj iu alia lerte faris sur ĝi serion da tute novaj movoj. Mi informiĝis, ke la du knabinetoj estas novuloj kaj ankaŭ la movoj estas nove projektitaj.

Dank' al la grandaj konkursoj en 1994, la fortaj gimnastinoj de la teamo, kia Mo Huilan, iom post iom maturiĝis teknike. Oni povas diri, ke la rapida alterniĝo de la novaj kaj malnovaj membroj de la ĉina virina teamo rezultis el ilia komuna penado. La virina teamo ekzercas sin ok horojn ĉiutage. Gimnastiko mem estas granda energio-konsuma sporto, tial iuj knabinetoj apenaŭ povas elteni trejniĝon. Foje ili eĉ ploris de laĉiĝo. La trejnistinoj tre atentigas sciencan trejnadon. Post ripetfoja esplorado ili trovis la metodon racie intensigi trejnadon kaj efikigi ĝin en difinita tempo kaj tio multe akcelis la trejnadon.

En la pasintaj 14 jaroj, kvankam la ĉinaj gimnastikaj teamoj

enskribis brilan paĝon en la sportan historion de Ĉinio, tamen ĉeftrejnisto Gao opiniis, ke la perspektivo ankoraŭ ne estas optimisma.

La kialo estas, ke la kandidatoj-gimnastoj venas ĉefe el amatoraj sportlernejoj kaj lokaj teamoj. Ĝenerale, la amatoraj sportlernejoj atentigas prepari sin por diversaj konkursoj kaj neglektas bazan trejnadon. Kiam kandidatoj-gimnastoj estas elektitaj kiel membroj de la ĉinaj teamoj, oni devas trejni ilin je iuj bazaj movoj. Sed la reala stato de Ĉinio ne permesas la elspezon por tio, kaj krome, pro malalta salajro kaj aliaj kialoj, iuj trejnistoj forlasas sian postenon kaj tio estas ĉagreninda. Fine, ankaŭ la postiginta scienc-esploro de Ĉinio malhelpas rapidan altiĝon de la ĝenerala nivelo de gimnastiko.

"Tial ĉiutage ni laboras sub la grandega premo kaj eĉ ne kutimas labori sen tiu premo." Estas videble, ke la laboro estas peniga, tamen Gao Jian kaj aliaj trejnistoj ĉiam energiplene iras antaŭen, malgraŭ la malfacilaĵoj. ■

## KURANTAJ AFEROJ

### POLITIKO

● De la 3-a ĝis la 18-a de marto 1995 okazis en Pekino la Triaj Sesioj de la Oka Tutlanda Popola Kongreso kaj la Oka Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. En la sesioj oni vaste diskutis pri agrikulturo, edukado, reformado de la grandaj ŝtataj entreprenoj kaj bremsado de inflacio. La Tria Sesio de la Oka Tutlanda Popola Kongreso aprobis la “Leĝon de Edukado” kaj “Leĝon de Banko”. La sesio aprobis ankaŭ la nomumon de Wu Bangguo kaj Jiang Chunyun kiel vicĉefministroj.

### ARKEOLOGIO

● Post longa esplorado oni konstatis, ke la katakombos en la templo Famen, kie oni trovis multajn rarajn trezorojn, inkluzive de fingra relikvo de Ŝakjamunio, estis Mandala de la esotera skolo de Budhismo en Tang-dinastio.

Mandala, sanskrita vorto de budhismo, signifas altaron. Tie la budhistoj kulturis sin kultante diojn.

Fakuloj trovis post esplorado, ke la katakombos estis aranĝita kiel Mandala de la esotera skolo de budhismo en Tang-dinastio, kiam ĝi estis fermita. La altaro por la osta relikvo de Gotamo estas la plej alta sanktejo por la budhisma mondo. La katakombos estis konstruita imite al la maŭzoleo de imperiestroj de Tang-dinastio, sed la dispozicio estis farita tute laŭ la altar-aranĝo de la skolo. Laŭ postsignoj oni povas kredi, ke antaŭ la fermiĝo de la katakombos oni faris grandiozan ceremonion por kulto de la relikvo.

● En 1972 ĉinaj arkeologoj trovis ĉe Yinquemonto de Linyi de Shandong-provinco 4 942 bambuajn latojn kun freŝkoloraj kaj klare distingeblaj skribaĵoj. 300 el ili surhavas la tekston de “Takti-

koj de Sun Zi” verkita de strategiisto Sun Zi en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) kaj 440 el ili surhavas la tekston de “Taktikoj de Sun Bin” verkita de strategiisto Sun Bin en la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.).

Specialistoj diris, ke la samtempa trovo de la klasikaj verkoj “Taktikoj de Sun Zi” kaj “Taktikoj de Sun Bin”, kiuj perdiĝis antaŭ 1 700 jaroj, solvis la problemon de ekspertizo pri ilia vereco. La trovo faris grandegan sensacion en la arkeologaro de la mondo. Post nelonge la loka registaro konstruis muzeon por la bambuaj latoj kaj eksponis bambuajn latojn, silkajn pentraĵojn, lakaĵojn kaj aliajn valorajn antikvaĵojn.

● Lastatempe ĉinaj arkeologoj trovis sur Xisha-insularo en la Suda Ĉina Maro multajn ruinojn de loĝejoj el la dinastioj Ming kaj Qing (1368-1911). Ili pravas, same kiel la ruinoj pli frue trovitaj, ke la Suda Ĉina Maro estas loko, kie ĉinoj vivas kaj laboras generacio post generacio. Fari produktadon kaj stariĝi ŝedojn sur koralaj insuloj de la teritoria maro estas tradicia kutimo de la ĉina popolo. Samtempe tio montras, ke la ĉinaj prapatroj aktivadis sur vasta tereno de la Suda Ĉina Maro.

### KULTURO

● Antaŭ nelonge la ekspozicio de objektoj kaj bildoj pri “100 Jaroj de Ĉinoj en Francio” vekis grandan intereson en Parizo.

Per objektoj kaj bildoj la ekspozicio konigis la centjaran historion de enmigiĝo, ekzisto kaj progreso far la ĉinoj en la franca socio. La altvaloraj historiaj materialoj pri Zhou Enlai kaj Deng Xiaoping, kiuj studis kaj laboris en Francio en 1920, profunde impresis la rigardantojn. Laŭ nekompleta statistiko, 283 ĉinoj estis en Francio en 1911 kaj nun en ĝi estas 300 000 ĉinoj, inkluzive de ĉinaj elmigrintoj.

### SPORTO

● Estis anoncita la rezulto de la balotado “Pumapokalo” pri la 10 plej elstaraj sportistoj de Ĉinio en 1994. Ili estis Mo Huilan (gimnastiko), Wang Tao (tablotenis), Wang Junxia (atletiko), Li Xiaoshuang (gimnastiko), Le Jingyi (naĝo), Wang Yifu (pafado), Zhong Huandi (atletiko), Zheng Haixia (basketbalo), Tan Shuping (plonĝo) kaj Dai Guohong (naĝo). La unua el ili estis gimnastino Mo Huilan, kiu gajnis 5 orajn medalojn en la lasta azia sportkunveno en Hiroŝimo, Japanio. Samtempe ŝi gajnis la plej altan honoran premion “Sporta Stelulino de Puma”.

### EKONOMIO

● En 1994 Ĉinio akceptis eksterlandan mendon de



La muzeo de bambuaj latoj



ŝipoj kun 1.42 milionoj da toneloj. Tio estis rekorda en la historio.

- En 1994 la hektara produktokvanto de rizo en Jiangsu-provinco superis 7 500 kg. Tio estis avangarda en la mondo.

- La Ĝenerala Kompanio de Aŭto-industrio de Ĉinio antaŭdiris, ke la nombro de bezonataj aŭtoj rapide kreskos en Ĉinio en la venontaj dekkelke da jaroj. En 2000 la nombro de bezonataj aŭtoj okupos la 7-an lokon en la mondo, kaj tiu en 2010 la trian lokon en la mondo.

- Februare de 1995, oni vidis, ke sur la fervojo inter Ranguno kaj Mandalay de Birmo veturas tute novaj blanka-blujaj vagonaroj. Ili estas muntitaj el la pecoj eksportitaj de la Qingdao-a Vagona Fabriko Sifang de Ĉinio. Tio markis la komenciĝon de la epoko, en kiu la ekstera komerco de Ĉinio transiris de eksporto de hardvaro al tiu de tekniko.

- En 1994 Xishuangbanna de Yunnan-provinco rikoltis 1 697 kg. da seka gumo sur ĉiu el siaj 50 700 hektaroj da kampoj. Tiu hektara produktokvanto estis egala al tiu de la Respubliko de Côte D'Ivoire, kies hektara produktokvanto rekordas en la mondo.

- En la pasintaj 15 jaroj Guangdong-provinco konstruis 4 111 pontojn kun totala longo de 180 km, kaj dank' al ili la dek ĉefaj ŝoseoj ne bezonas plu pramejojn. Tio estas senprecedenca en la historio de ponto-konstruado de Ĉinio, kaj la loko fariĝis "muzeo de pontoj" kun moderna karaktero.

### MEDICINO

- En 1994 Ĉinio elfaris novan antimalarian medikamenton kaj petis patenton en 60 landoj kaj regionoj, kaj Aŭstralio kaj Sud-Afriko jam agnoskis la patenton. Tio estis la unua fojo, ke ĉina medikamento ricevis patenton eksterlande.

### EDUKADO


- Pere de demokratia rekomendo Tongji-universitato de Ŝanhajo elektis inter 4 kandidatoj la 47-jaran s-inon Wu Qidi, doktorigan instruistino kaj specialistino de intelekta regado, kiel direktoron de la universitato. Ŝi doktoriĝis en politekniko de Svisio kaj reveninte al Ĉinio en 1986, ŝi eklaboris kiel estrino de instrua kaj esplora sekcio de la universitato kaj poste kiel ĝia vicdirektoro. Demokratia rekomendo pri universitata direktoro estis senprecedenca en Ĉinio.

### MEDIPROTEKTO

- Ĉinio estas unu el la landoj kun plej riĉaj faŭno kaj flaŭro. Sole la vertebrularo nombras 4 000 spe-

cojn, pli ol dekonon de tiu de la mondo. La altklasaj vegetaloj kun 32 miloj da specoj konsistigas 12% de tiuj de la mondo.

Nun Ĉinio havas 501 rezervejojn kun totala areo de 50 milionoj da hektaroj. En Pekino, Kunming kaj Xi'an estas centro por pereontaj bestoj, kie oni efektivas la planon por savi sovaĝajn bestojn, kiaj pando, aligato, Hainan-a cervo, elafuro (*Elaphrus davidionus*), longnaza antilopo, sovaĝa ĉevalo kaj orhara simio. Oni establis 400 botanikajn ĝardenojn, kie oni flegas pli ol 1 000 specojn da pereontaj vegetaloj, inkluzive de ora kamelio, kolomboarbo (*Davidia involucrata*), metasekvojo (*Metasequoia glyptostroboides*) k.a. En la lastaj jaroj de la kuranta jarcento Ĉinio establos 100 rezervejojn por arbaroj, sovaĝaj bestoj kaj vegetaloj, kaj tiam la totala areo de la rezervejoj superos 60 milionojn da hektaroj.



Orhara simio

### SOCIO

- En la pasintaj jaroj, pro ŝanĝiĝo de la vivmaniero, multaj kamparanoj venis al la "servistina merkato" de Kantono por dungi servistinojn, kaj ili pagis pli multe ol kantonanoj.

- Ĉe la ekstremo de Luohu-ponto sur la limo inter Shenzhen kaj Hongkong estas konstruata la elektronika retrohorloĝo, monumento pri reveno de Hongkong al la patrolando. La konstruado finiĝos la 1-an de julio 1995, du plenajn jarojn antaŭ ol Ĉinio restarigos sian suverenecon super Hongkong.

La soklo de la monumento estos masonita el marmoro kaj sur la monumento estos gravuritaj la gravaj paragrafoj de la interparolo de la ĉina gvidanto s-ro Deng Xiaoping kaj la brita ĉefministro s-ino M.H. Thatcher pri la problemo de Hongkong.

## EL ĈINAJ GAZETOJ

### TRAFIKA KONSTRUADO SUR LA MONDA TEGMENTO

Tibeto, meznombro 4 000 m super la marnivelo, estas la unusola senfervoja regiono de Ĉinio. Tie la ŝoseoj plejparte estas malaltklasaj. En 1994 la tibeta registaro asignis grandan monsumon por konstrui ŝoseojn en vilaĝoj. Nun iras reordigado kaj rekonstruado de la ĉefaj partoj de la Qinghai-Tibeta Ŝoseo, vivlinio de Tibeto, kaj finiĝis rekonstruado de la parto en la mezo, t.e. la turisma vojo. Iu nova internacia ŝoseo, kiu transiros Himalajon, estos konstruita post nelonge. En 1994 oni konstruis kaj rekonstruis ŝoseojn kun totala longo de 325 km en Tibeto.

Aerlinio estas grava ligilo de Tibeto kun aliaj lokoj de Ĉinio. Pasintjare finkonstruiĝis la moderna aerodromo Bangda en Tibeto kaj Lhasa-aerodromo ekhavis novan aerlinion.

### BATALO KONTRAŬ MIKROTAJ KAJ FIINSEKTAJ KATASTROFOJ

Post pli-ol-dekjara penado Ĉinio akiris unuan sukceson en batalo kontraŭ mikrotoj kaj fiinsektoj, kiuj grandaree detruis stepon, kamparon kaj ekomedion. Antaŭe en Ĉinio ĉiujare 34 milionoj da hektaroj da kampoj estis atakataj de mikrotoj kaj fiinsektaj katastrofoj, kaj nun la detruitaj areoj malpliĝis al 24 milionoj da hektaroj, i.a., oni faris bio- kaj eko-rimedojn sur 16 milionoj da hektaroj por nuligi la detruon.

La reproduktiĝemaj mikrotoj kaj fiinsektoj, precipe kampmusoj, longungaj musoj kaj akridoj, terure detruas kampojn. Ĉiujare almenaŭ 15 miliardoj da kg da herboj estis formangitaj de ili. De 1983 la ĉina registaro ĉiujare asignis dek milionojn da juanoj speciale por la batalo kontraŭ mikrotoj kaj fiinsektaj katastrofoj. En multaj lokoj de la Interna Mongolio, Xinjiang, Qinghai, Sichuan kaj aliaj sep provincoj kaj aŭtonomaj regionoj estas starigita stacio por prognozi tian katastrofon cele ĝustatempe alpreni kontraŭrimedojn, kia aviadila ŝprucigo de insekticido.

### SABLOTERAPIO

La nomita terapio estas efika ĉina terapio kun historio de centoj da jaroj. En somero aroj kaj aroj da homoj veturas al Mingsha-monto de Dunhuang, Gansu-provinco de nordokcidenta

Ĉinio, por sunumi sin.

En 1988 estis establita la sabloterapia kliniko. Ĝis nun la kliniko kuracis pli ol 40 000 pacientojn, el kiuj la plej multaj estis suferantoj de kronika lumbalgio kaj kruralgio, artrito, iskiatalgio, osteca prolifero kaj periartrito de ŝultro. La statistiko de 10 000 kazoj montras, ke 97.1% de la suferantoj pli-malpli resaniĝas, se ili estas kuracitaj per la terapio 14-21 tagojn. Escepte de alttensiuloj, mensaj malsanuloj kaj gravedulinoj, ĉiuj suferantoj de la supre menciitaj malsanoj povas esti kuracataj per la terapio. La terapio estas efika ankaŭ por dermozuloj kaj vaskularituloj.

Dank' al siaj granda uzebleco, kontentiga efiko kaj malmulta pagigo la kuracado fariĝis alia bela bukedo en la ĉina senmedikamenta terapio. La sablo de Mingsha-monto konsistas el eroj ruĝaj, flavaj, verdaj, nigraj kaj blankaj kaj entenas ne nur abundon da magnetito, sed ankaŭ kalcion, magnezion, feron, kalion, natrion, selenon, zinkon, stroncion kaj aliajn mikroelementajn substancojn. Tiuj elementoj estas tre efikaj por kuraci reŭmatismen.

Ĉe Mingsha-monto regas seka klimato kaj multas sunaj tagoj. Gvidate de kuracistoj, la malsanuloj kovras la malsanan lokon de sia korpo per varma sablo, por ke ĝi premu koncernajn histojn kaj tiel donu kuracefikon. Dume la kuracatoj tutkorpe ŝvitegas kaj la varmo de sableroj komunikas sin al la ĉeloj de la histoj, kio estigas fortan moviĝon de molekuloj, apartan efekton de varmo interne de la korpo kaj komunikadon de varmo al la histoj. Asimilado de efikaj elementoj de sableroj tralasitaj tra la haŭto, malseka kaj varma stimulado de la malsana loko de la korpo kaj tiu de kongesto al la organismo dilatas la periferiajn vaskulojn, rapidigas cirkulon de sangokvanto kaj metabolon, vigligas la funkcion de la endoderma reto, intensigas la imunecon de sango kaj akcelas produktadon de interferono en la korpo. Dank' al tio, la funkcio de la nervaj sistemoj retrovas sian vigecon. Helpe de fotosintezo kaj stimulado, la asimilitaj mikroelementoj en sableroj per sangocirkulo reguligas la ekvilibrojn de la homa korpo kaj sukcesigas la kuracadon.

La plej bona sezono por sabloterapio estas de la mezo de majo ĝis la mezo de aŭgusto.

## DU POEMOJ

### Ni estas okulparo

de NIU BO

*Ni ja ne divideblas kiel*

*okulparo*

*mi ridas, kiam via rido*

*ĉarmas*

*mi verŝas larmojn dum vi*

*larmas*

*neniam diferencas niaj*

*faroj*

*ni kuŝas proksimloke*

*sed nin ne povas vidi re-*

*ciproke*

*ni scias unu la alies po-*

*zicion*

*neniam povas intertuŝi nin*

*apoge.*

*la vida mondo dividiĝas al*

*ni je duonoj*

*sed ilin en tutaĵon ni kun-*

*metos*

*se apartigos nin sortodis-*

*pono*

*la mondo tiam ne kom-*

*pletos*

*se unu el l' okuloj mal-*

*aperos*

*perdiĝos ne duono de la*

*vidosfero*

*sed tiam vidi l' tutan*

*mondon*

*fariĝos unu-okula afero.*

*se unu el l' okuloj en mal-*

*lumon falus*

*la resta duobligon de la*

*lumo farus*

*sed ne fariĝu tiel, tio ja*

*ne eblus*

*kvankam la vidkapabloj de*

*ni ne egalus.*

*ĉar ni ja estas du radiaj*

*faskoj*

*interplektitaj je la nasko*

*neniam ni ja povas vidi*

*unu la alian*

*ni tamen kunagadas ĉiam*

*en plenum' de l' tasko...*

### Pluveroj

de LEI SHUYAN

*La majaj pluveroj —*

*maturaj vinberoj —*

*faladas unuj post aliaj,*

*en sinon de l' Tero!*

*Nun estas sezono por vin-*

*faro:*

*jen ĉie odoras mielo,*

*jen ĉie aromas vinkeloj.*

Elĉinigis LAŬLUM

## Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

# ĈINA CERAMIKO

Ĉinio estas hejmlando de porcelanaĵoj.

La ceramika produktado de Ĉinio komen-  
ciĝis en neolitiko. La libro detale konigas  
al vi la historion de la ĉina ceramiko.


Formato: 12 cm. × 18.4 cm. 260 p. kun 16  
koloraj kaj 45 nigra-blankaj bildoj.

Prezo: 6.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fakoj de EPC, Libro-  
servo de UEA aŭ peranto de EPC en via  
lando.







Internacia Vortaro de Mikroba Genetiko (Esperanta-angla-ĉina) estas verkita de s-ro Ralph A. Lewin, prof. de biologio en Kalifornia Universitato, kaj

elesperantigita de s-ro Xu Senrong. La vortaro entenas pli ol 700 terminojn. Krom terminoj specifika en mikroba genetiko kaj molekula biologio, la vortaro entenas ankaŭ la plej ofte uzatajn terminojn de la ordinara genetiko (de eŭkariotaj plantoj kaj bestoj) kaj biokemio. Ĝi estas kompilita en tri lingvoj: Esperanto, angla kaj ĉina lingvoj. La vortaro estas ampleksa kaj precize klarigita. Ĝi estas referenca, praktikebla por fakuloj.

Formato: 13 × 18.50 cm. kun 128 pĝ.

Prezo: 12.00 USD

Mendu ĉe Distribua Fako de EPĈ, Libroservo de UEA aŭ nia peranto en via lando.

## GALERIO

### Trikolora tombogarda besto

Teksto de DONG PEIQIANG

La trikolora fajenca tombogarda besto kun alto de 130.2 cm. estis farita en Tang-dinastio (618-907). Ĝi estis trovita en Gansu-provinco en 1965.


La besto havas la kolorojn flavan, verdan kaj blankan. Dum bakado en nealta temperaturo la glazuro fluis kaj disvastiĝis, sekve la koloroj fariĝis pli variaj kaj belaj. La bestoj kutime gardas en paro antaŭ tombo. El ili unu kun besta korpo kaj besta vizaĝo staras en unu flanko, kaj la alia kun homa vizaĝo kaj besta korpo en la alia flanko. Ili kuŝas aŭ kaŭre sidas. La antikvuloj esperis, ke ili fortimigos minacon de malbonuloj kaj defendos la animon de la mortinto. La ĉi tie montrata besto estas en la pozo de kalkansido. Ĝi havas grandegajn kornojn sur la kapo kaj po unu flugilon sur la ŝultroj. La haregoj sur la nuko hirte staras, kaj la okuloj kvazaŭ elfalas; en la faŭko estas dentegoj, kaj sur la vangoj la haregoj hirtaj kiel pikiloj. La du flugiloj surhavas orajn makulojn. La terura vizaĝo manifestas fortecon kaj nevenkeblecon. Kredeble, ĝi faros atakon en ajna tempo. Ĝi estas tre rara inter la trikoloraj fajencaĵoj de Tang-dinastio.

### ABONTARIFO DE EPĈ POR 1995

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY	1900,00	1600,00	3500,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00
<b>TARIFO A:</b> Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.				
<b>TARIFO B:</b> Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.				
<b>TARIFO C:</b> Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.				
<b>Rim.</b> Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10,00 usonajn dolarojn.				







Pagodo en Xishuangbanna

Foto de LIU SIGONG

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九五年第七期  
(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号:CN11 1339